

Etnismo

N-ro 102 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 31.12.2019

Indiĝenaj Lingvoj en Usono



Historio kaj Estonteco

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldonista letero. p. 3
- La Historio kaj estonteco de indiĝenaj lingvoj en Usono, ilustritaj per tri ekzemploj p. 4 – 10
- 1968, oficiala startpunkto: la skriba normo-lingvo de la eŭska (*euskara batua*) p. 11 – 16
- La kornvala pioniro de revivigitaj lingvoj p. 17 – 20
- “Mejloŝtono en Sudameriko” p. 21
- “Antaŭe, ni estis ‘ebriuloj kaj mizeruloj’; nun, ‘teroristoj’” p. 22
- Konkize el ... p. 23
- Sekve el ... p. 23 - 24
- IKEL-informilo 81 p. 25 - 27.
- Deklaracio de *Sitting Bull*. Mapo pri indiĝenaj grupoj en USONO. P. 28

Foto sur la kovrilpaĝo:

El pentraĵo de la Batalo de *Little Bighorn*, fama epizodo en la Indianaj Militoj (p. 7).

nps.gov/libi/learn/historyculture/images/Call_of_the_Bugle.jpg?maxwidth=650&autorotate=false

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5 €). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la “**IKEL-Infomilo**” estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: Alain FAVRE (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
SEKRETARIO: Nikolas XIL CARVALHO (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: Xabier RICO ITURRIOTZ (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio
retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:
István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÓS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

DUA REVIZIANTO (eksterkomitata): Nancy Fontannaz

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ “tria-monda” lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian **IKEL**-kotizon ekskluzive al la konto de **IKEL** ĉe UEA (kodo: **ikel-y**), **UNIVERSALA ESPERANTO-** (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- BELGA poŝtgironto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**
- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**
BLZ 370 10050 IBAN:
DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF
- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64** IBAN:
NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21
- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**
IBAN: SE9595000099604200743740,
SWIFT **NDEASESS**
- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku “**ikel-y**” kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certiĝi, ke via kompleta kotizo alvenu al la **IKEL**-konto: **IKEL** absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko-aŭ peradkoston!

Perantoj:

- FRANCIO eblas sendi ĉekojn al Alain Favre. (Poŝtadreso ĝi-supre.)
- NORVEGIO Anne Karin Bondhus <akbondhus@jkn.no>
- KATALUNIO Victor Solé <v.sole@esperanto.cat>


Eblas reklami en *Etnismo*!

Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6

Venonta redaktolimdato:
30-a de aprilo 2019

ELDONISTA LETERO

Lasta Sentinelo en la oceano



La Andamanaj insuloj situas en la Hindia Oceano, je proksimume 500 km sude de Birmo, sed ili apartenas al Barato. Jarcentojn post arabaj navigistoj, ankaŭ Marko Polo ekkonis ilin kaj menciis ilian malbonan famon pro la “kapĉasistoj”, kiuj loĝas tie kaj timigas la scivolemulojn. Tiuj insuloj estas ja parte loĝataj, eĉ de tre longe (eble 60 000 jaroj!), de etaj kaj nigrhaŭtaj homoj, kiuj ŝajne ne aparte parencas kun la aliaj sudazianoj. Eŭropanoj tre malfacile povis albordiĝi, sed tiuj insuloj estis tamen aneksitaj de Danlando en 1754 kaj aĉetitaj de Britio en 1789. De tiam ili estis parto de la hindia imperio brita, el kio venas ilia nuna aparteno.

Kvankam tre rezistemaj, la indiĝenoj konis la neenviindan sorton de la plej multaj aliaj praloĝantoj en la mondo: perdon de teritorio, de suvereneco, de kulturo, minoritatigon en la propra lando, alkoholismen... Kompreneble tre multaj mortis –


kaj plu mortas! – pro kontakto kun por ili novaj virusoj kaj bakterioj. Entute ili estas nuntempe malpli ol mil, inter la pli ol 300 000 loĝantoj de la insularo, kaj ofte provas vivi iom aparte, sed la “civilizo” pli kaj pli alproksimiĝas kaj ilin englutas. Unu el iliaj lingvoj, la *bo*, perdis sian lastan parolantaron en 2010, kaj oni povas prognozi rapidan malaperon de la (tri aŭ kvar) aliaj.

Tamen unu el tiuj insuloj tre bone rezistas: temas pri Norda Sentinelo, kiu troviĝas iom okcidente, sufiĉe for de la aliaj. Kvankam ekzistis kelkaj kontaktoj eĉ dum la lastaj jardekoj, la nunaj sentineloj ne plu deziras vizitojn kaj sisteme pafas lancojn aŭ sagojn al vizitemuloj. Malgraŭ nuna ŝtata malpermeso tiuj ĉi plu alproksimiĝas, per fiŝboatoj, foje helikopteroj, el kiuj oni foje ĵetas nutraĵojn. Multaj bonanimuloj ja ne povas elteni tian izoligemon, kiam tiom da mirindaĵoj atendas tiujn homojn flanke de la ekstera mondo...

Eĉ pli terure: lastnovembre juna usonano estis sage mortigita, kiam helpe de fiŝistoj li alvenis sur la bordo de Norda Sentinelo. Kiucele 27-jarulo albordiĝas tute sola sur insulo, kiu estas malpermesata al vizitantoj? Kvankam iuj informiloj parolis pri aventuro kaj gloravido, letero sendita al familianoj la matenon mem de la mortotago montras, ke tiu junulo sincere volis “alporti Jesuon” al la insulanoj. Bedaŭrinde ne la eternan vivon li povis dissemi, sed eble rapidan morton, pere de ĝermoj, kontraŭ kiuj la insulanoj ne imunas. Tiom pli, ke la kadavro estis forportita de pluraj homoj, eble mistraktata (kaj formangita?) poste. Kaj iuj jam volas sendi avietojn por filmi la tribon – kiu konsistas el inter 50 kaj 150 homoj – kaj tiel scii, ĉu ĝi rezistos al tia enstrudiĝo.

En la internacia jaro de la indiĝenaj lingvoj ni tutcerte ne aŭdos la sentinelojn, kaj feliĉe. Plej verŝajne bone vestitaj aŭtoktonoj esprimiĝos perfekte en la angla, franca aŭ rusa, rekte en la mikrofono kun flanko okulo al la poŝtelefono. Sed, en tiu epoko de novjaro, mi sendu nericeveblajn bondezirojn pri longa kaj feliĉa vivo al tiuj insulanoj, kiuj konsistigas defion al nia tutmondiĝema mondo, kies vivdaŭro malfacile povus superi la sesdek mil jarojn de tiu izolita insula tribo.

Alain Favre



earthobservatory.nasa.gov/images/42136/north-sentinel-island-andaman-sea
Satelita foto de la Norda Sentinel-Insulo, 20.11.2009.

La historio kaj estonteco de indiĝenaj lingvoj en Usono, ilustritaj per tri ekzemploj

Enkonduko

La historio de indiĝenaj lingvoj (t.e. tiuj lingvoj, kiuj iaforme estis parolataj antaŭ la alveno de eŭropanoj) en Usono estas temo ofte ignorata, sed kerna al la estiĝo de Usono, kia ĝi nun statas, kaj grava al la nuntempa strebado por pli daŭripova kaj justa lingvosistemo mondscale. Ĉi tie mi ilustras la socian historion de usonaj indiĝenaj lingvoj per tri ekzemploj: la ĉeroka (CWY/*Tsalagi*), irokeza lingvo en Oklahomo; la dakota (*Dakhóta Iápi*), siua lingvo en Minesoto; kaj la denaina (*Dena'ina Qenaga*), denea lingvo en Alasko. Mi ankaŭ resumas la nuntempan komprenon de la meĥanismoj lingvomortigaj rilate la indiĝenajn lingvojn de Usono, kaj la modernan movadon “revigligi” aŭ “revivigi” ilin.

Por multaj homoj, movadoj kaj instancoj interesitaj pri lingva kaj interhoma justeco, kreskas la sento, ke nepra por la nutrado de pli harmoniaj rilatoj inter la diversaj popoloj estas plurlingvismo. Tradicie oni tamen ligas la plurlingvismon al la “malnova mondo” (Afriko, Azio kaj Eŭropo) dum en la “novaj” Amerikoj nur kvar lingvoj – la hispana, angla, portugala, kaj franca – dividas inter si du tutajn kontinentojn, kaj estas tre nekutime (krom eble en Kebekio) regi kaj uzi pli ol unu el ili. Kaj tiu opinio, kvankam ĝi vere estas troigo, ne estas tute kontraŭfakta. Ekzemple, en Usono 79% de la loĝantaro parolas la anglan hejme, kaj nur malmultaj regas duan lingvon je komunika nivelo (1). Krom la hispana en kelkaj regionoj, neanglaj lingvoj estas ĉefe parolataj en malgrandaj, disaj komunumoj de enmigrintoj, kaj kutime (kvankam ne ĉiam) estas forlasataj sufiĉe rapide post alveno (1).

Sed Usono ne ĉiam estis regata de unu lingvo, kaj iam estis eĉ pli multlingva ol Eŭropo. Antaŭ ol alvenis eŭropanoj, oni kalkulas, ke miloj da lingvoj estis parolataj tra nuna Usono (2). Ĉi tiuj indiĝenaj lingvoj estas gramatike kaj vortostoke tute malsimilaj ol tiuj de la koloniintoj, kaj ege diferencas ankaŭ inter si mem. Sekve mi prezentos malgrandan enkondukon en tiun diversecon.

Klasifiko de Amerikaj Lingvoj

La indiĝenaj lingvoj de Nordameriko estas klasifikitaj laŭ pluraj lingvofamilioj, kune kun granda nombro da “izolitaj” lingvoj (kiel la eŭska) sen konata

rilato al iu ajn alia lingvo. Jen listeto (3) de la plej grandaj familioj kaj ties (malnete difinitaj) tradiciaj teritorioj: (Vidu mapon dorsopaĝe de la kovrilpaĝo).

- La Algonkena aŭ Alga familio (*Algonquin*), parolata tra la norda parto de orienta Nordameriko, el apudmara Virginio ĝis Alberto.
- La Denea (aŭ Atabaska) familio (*Na-Dene / Athabaskan*), parolata tra la nordokcidenta kvarono de la kontinento, kun aldona grupo (la apaĉeaj lingvoj) en Arizono kaj Novmeksiko.
- La Eskimo-Aleuta aŭ Inua familio (*Eskimo-Aleut*), parolata laŭlonge de la norda marbordo ekde la Aleuta insularo (Alasko) ĝis Gronlando.
- La Irokeza familio (*Iroquois*), parolata en la norda parto de moderna Novjorkio kaj la valo de la rivero Sankta-Laŭrenco, kun unu grava lingvo (la ĉeroka) en la suda parto de la Apalaĉaj montoj.
- La Jut-Azteka familio (*Uto-Aztecan*), parolata tra la suda parto de la Roka Montaro kaj en granda parto de norda kaj centra Meksiko (la lingvo de la Aztekoj, (*Nahuatl*) apartenis al ĉi tiu familio).
- La Muskoga familio (*Muskogean*), parolata en la sudorientaj malaltejoj (nuntempe la ŝtatoj Alabamo, Misisipio, Georgio kaj Florido).
- La Siua familio (*Siouxan*), parolata tra la ebenejoj de centra Usono kaj sud-centra Kanado, kun pliaj membroj en Virginio kaj Norda Karolino.

Estas eble, ke ekzistas pli profunda parenceco inter amerikaj lingvoj, sed ĝi restas ĝis nun tute teoria(3). Laŭ mia scio, la popoloj, lingvoj – krom la plej grandaj – kaj lingvofamilioj de Ameriko kutime ne havas konvenciajn nomojn en Esperanto. Ĉi tie mi fonetike esperantigas ilin surbaze de la indiĝena formo (krom en la kazo de la ĉeroka, kiu estas jam sufiĉe konata) kaj poste metas parenteze la indiĝenan kaj anglan nomojn.

Ekzemploj

Mi ilustras la ĝeneralan historion de la indiĝenaj lingvoj de Usono per tri ekzemploj, kiujn mi mem estas lingvosciencistoj studinta. Unue mi pritraktos la ĉerokan lingvon (CWY/*Tsalagi*, *Cherokee*), kiu estas, kiel supre menciite, irokeza lingvo originale parolata en la sudo de la apalaĉa montaro(2); due la dakotan (*Dakhótiapi*, *Dakota*), siuan lingvon, kiu donis sian nomon al la ŝtatoj de Norda kaj Suda Dakoto, parol-

atan tie kaj en okcidenta Minesoto, kun proksime parencaj dialektoj en Nebraska kaj suda Kanado(4); kaj fine la denainan (*Dena'ina Qenaga, Tanaina*), lingvon de la denea familio parolata en la sud-centra parto de Alasko, ĉirkaŭ la urbo de Anchorage(5).

La ĉeroka

Je la alveno de eŭropanoj en Amerikon, la ĉeroka popolo estis unu el la pli grandaj, kaj laŭ teritoria vasteco kaj laŭ homonombroj, en Nordameriko. Ĉar ili ne loĝis proksime al la marbordo, ili ne partoprenis la unuajn kontaktojn inter amerikanoj kaj eŭropanoj, sed rapide eksciis pri la alveno de koloniistoj, kaj egale rapide fariĝis viktimoj de la epidemiaj malsanoj alportitaj de ili (2).

En la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj, la ĉerokoj faris grandajn penojn alproprigi la teknologion kaj kulturon de la alvenintoj. Ili komencis porti eŭropstilajn vestaĵojn, konstrui eŭropajn domojn, kaj iuj eĉ posedi sklavojn (6). Kune kun la ĉaĥtaoj (*Chahta' / Choctaw*), ĉikaŝaoj (*Chikahsha / Chickasaw*), maskokoj (*Muskogee, Creek*), kaj seminoloj (*Seminole*), la ĉerokoj estis konsiderataj unu el la "Kvin Civilizitaj Triboj" (*Five Civilized Tribes*) (6) – t.e. tiuj, kiuj plej sukcese adaptis sin al eŭropa kulturo.

Dum tiu epoko okazis tre grava evento en la lingva historio de Nordameriko. Ĉeroka viro nomita *Sequoyah*, nekapabla legi aŭ paroli la anglan, estis fascinita de la "parolantaj folioj" kiujn havis la koloniistoj (7). Kvankam li ne komprenis, kiel funkcias skribo, li sukcesis elpensi propran sistemon skribi la ĉerokan lingvon (7). Lia sistemo estis

Cherokee Alphabet					
D.	R.	T.	Ꭰ.	C.	i.
S. Ꭱ.	Ꭲ.	Ꭳ.	Ꭴ.	Ꭵ.	Ꭶ.
Ꭷ.	Ꭸ.	Ꭹ.	Ꭺ.	Ꭻ.	Ꭼ.
Ꭽ.	Ꭾ.	Ꭿ.	Ꮀ.	Ꮁ.	Ꮂ.
Ꮃ.	Ꮄ.	Ꮅ.	Ꮆ.	Ꮇ.	Ꮈ.
Ꮉ.	Ꮊ.	Ꮋ.	Ꮌ.	Ꮍ.	Ꮎ.
Ꮏ.	Ꮐ.	Ꮑ.	Ꮒ.	Ꮓ.	Ꮔ.
Ꮕ.	Ꮖ.	Ꮗ.	Ꮘ.	Ꮙ.	Ꮚ.
Ꮛ.	Ꮜ.	Ꮝ.	Ꮞ.	Ꮟ.	Ꮠ.
Ꮡ.	Ꮢ.	Ꮣ.	Ꮤ.	Ꮥ.	Ꮦ.
Ꮧ.	Ꮨ.	Ꮩ.	Ꮪ.	Ꮫ.	Ꮬ.
Ꮮ.	Ꮯ.	᐀.	ᐁ.	ᐂ.	ᐃ.

Source: representation by the author.

Ꭰ Ꭱ Ꭲ Ꭳ Ꭴ Ꭵ Ꭶ Ꭷ Ꭸ Ꭹ Ꭺ Ꭻ Ꭼ Ꭽ Ꭾ Ꭿ Ꮀ Ꮁ Ꮂ Ꮃ Ꮄ Ꮅ Ꮆ Ꮇ Ꮈ Ꮉ Ꮊ Ꮋ Ꮌ Ꮍ Ꮎ Ꮏ Ꮐ Ꮑ Ꮒ Ꮓ Ꮔ Ꮕ Ꮖ Ꮗ Ꮘ Ꮙ Ꮚ Ꮛ Ꮜ Ꮝ Ꮞ Ꮟ Ꮠ Ꮡ Ꮢ Ꮣ Ꮤ Ꮥ Ꮦ Ꮧ Ꮨ Ꮩ Ꮪ Ꮫ Ꮬ Ꮭ Ꮮ Ꮯ ᐀ ᐁ ᐂ ᐃ

Ꭰ Ꭱ Ꭲ Ꭳ Ꭴ Ꭵ Ꭶ Ꭷ Ꭸ Ꭹ Ꭺ Ꭻ Ꭼ Ꭽ Ꭾ Ꭿ Ꮀ Ꮁ Ꮂ Ꮃ Ꮄ Ꮅ Ꮆ Ꮇ Ꮈ Ꮉ Ꮊ Ꮋ Ꮌ Ꮍ Ꮎ Ꮏ Ꮐ Ꮑ Ꮒ Ꮓ Ꮔ Ꮕ Ꮖ Ꮗ Ꮘ Ꮙ Ꮚ Ꮛ Ꮜ Ꮝ Ꮞ Ꮟ Ꮠ Ꮡ Ꮢ Ꮣ Ꮤ Ꮥ Ꮦ Ꮧ Ꮨ Ꮩ Ꮪ Ꮫ Ꮬ Ꮭ Ꮮ Ꮯ ᐀ ᐁ ᐂ ᐃ

< <https://cdn.britannica.com/s:700x450/90/68390-004-E8989DEA.jpg> >

La ĉeroka silabaro.




El Vikimedio.

Litografio de la 19a jarcento: Sekojaho portante tableton kun la ĉeroka silabaro.

“silabaro,” laŭ kiu ĉiu sinsekvo de konsonanto kaj vokalo havas apartan literon. Ekzemple la litero W prononciĝas “la” (7). Kiel montras ĉi tiu ekzemplo, *Sequoyah* desegnis multajn el siaj literoj surbaze de la latina alfabeto, sed ĉar li ne sciis, kiel tiuj literoj prononciĝas, liaj signoj reprezentas tute aliajn sonoj (7).

Dum *Sequoyah* prilaboris sian inventon, liaj samnacionoj plejparte rifajfis lin, sed kiam li finis kaj prezentis la projekton, ĝi tuj furoriĝis kaj estis lernita de miloj da ĉerokoj (7). Post nelonge oni fabrikis ĉerokan tajpon kaj presilon en la ĉeroka ĉefurbo *New Echota*, per kiu granda aro da materialoj estis presita, inkluzive dulingvan gazeton, *The Cherokee Phoenix* (“La Ĉeroka Fenikso”) (7). En tiu epoko, la ĉeroka laŭŝajne estis la gepatra lingvo de ĉiuj ĉerokoj kaj la sola lingvo de la vasta plimulto.

Sed la sorto de la ĉerokoj malboniĝis en 1829, kiam enoficiĝis la popolisma prezidanto *Andrew Jackson* (6). Ĝis tiam la landa registaro plejparte klopodis eviti konflikton inter koloniistoj kaj indiĝenoj, kvankam pli kaj pli da blankuloj ekloĝadis en indiĝena tereno (6). Sed *Jackson* ricevis sian plej fortan subtenon el la malriĉaj blankaj pioniroj ĉe la rando de kreskanta Usono (6). Tiuj homoj plimultiĝadis kaj volis pli da tereno, kaj perceptis indiĝenojn kiel minacon al siaj bienoj kaj ambicioj. En drasta renverso de la registara sinteno rilate indiĝenojn, *Jackson* ordonis la forpelon de la Kvin Civilizitaj Triboj al la nova “Indiana Teritorio” (*Indian Territory*), kiu poste fariĝis la ŝtato Oklaho-



Eltiraĵo kaj adapto de mapo el Vikimedia. Aŭtoro: *Neddy1234*.

Lokoj, kie enketintoj diris, ke ili povas paroli ĉeroke en la jaro 2000.

Mo (6). La Supera Kortumo de Usono deklaris la agon kontraŭkonstitucia, sed *Jackson* plenumigis sian ordonon malgraŭ ilia ne tro vigla protesto (6).


La katastrofa marŝado al Oklahomo estas memorata en la historio kiel la "Vojo de Larmoj" (*Trail of Tears*). Multaj homoj pereis survoje pro elĉerpiĝo, malsato, soifo kaj malsano (6). Kvankam malgranda parto de la ĉeroka nacio restis en Norda

Karolino (kie la lingvo nun havas kelkajn parolantojn), la vasta plimulto aŭ mortis aŭ ekloĝis en la Indiana Teritorio (6). Sed ilia lingvo transvivis, kaj eĉ la presilon de *New Echota* oni kunportis al la nova teritorio, kie eldonado en la ĉeroka lingvo daŭras per novaj metodoj eĉ nuntempe (7). Tiuepoke la ĉeroka ankoraŭ estis la ĉefa lingvo de sia tuta komunumo.

La ago, pro kiu vere komenciĝis la forvelko de la ĉeroka lingvo (kaj de indiĝenaj lingvoj ĝenerale) estis la starigo, ekde 1879, fare de la usona registaro, de "indianaj industriaj lernejoj," (*Indian industrial schools*), kies celo estis la "civilizigado" de la indiĝenaj popoloj (8). Iuj indiĝenaj familioj en ĉiu regiono estis devigitaj forsendi siajn infanojn al tiuj lernejoj,

kie ili loĝis la tutan jaron krom dum kelkaj ferioj (8). En ĉi tiuj lernejoj regis politiko de kompleta samkulturigo. Ilia fama celado estis "mortigi la indianon por savi la homon (8)." Tio signifis malpermeson de ĉiuj indiĝenaj kutimoj: oni tondis iliajn tradicie longajn harojn, vestis ilin per eŭropaj vestaĵoj, kaj kompreneble devigis ĉiujn paroli nur angle. Estis rutine lavi la buŝon de iu ajn studento parolinta sian propran lingvon, kaj eĉ se la instruistoj estus pli toleremaj, la angla estis necesa al la studentoj mem kiel komuna lingvo, ĉar kutime ili venis de malproksime kaj apartenis al tre diversaj triboj (8).

La epoko de la indianaj lernejoj daŭris preskaŭ jarcenton, ne tute ĉesante ĝis la 197-aj jaroj (8). Ankoraŭ multaj homoj memoras sian tempon tie, kaj ili raportas tre traŭmatajn spertojn. Sed ankaŭ ilia efiko sur la lingvojn estis ege traŭmata. La ĉeroka, ekzemple, estas nun unu el la plej grandaj indiĝenaj lingvoj en Nordameriko, sed havas nur ĉirkaŭ 12 300 parolantojn (9) (entute estas ĉirkaŭ ducent mil parolantoj de ĉiuj in-diĝenaj lingvoj (1). Ekzistas pluraj kialoj por la drasta malfortiĝo de indiĝenaj amerikaj lingvoj, sed la indianaj lernejoj estas ŝajne la ĉefa.



<http://www.georgiatribeofeasterncherokee.com/UserFiles/Image/phoenix.jpg>
Numero de La Ĉeroka Fenikso.



http://carlisleindian.dickinson.edu/sites/all/files/imageslideshow/DKC_MC200804_b01_f13_postcard2_0.jpg

La plej fama Indiana Lernejo, *Carlisle*, Pensilvanio.



Adapto de mapo el Vikimedia. Aŭtoro: *Popo le Chien*.
Dakotaj Teritorioj de 1861 al 1889.

La dakota

La historio de la dakota lingvo estas simila al tiu de la ĉeroka, sed eĉ pli violenta ol tiu. Denove ni konstatas, ke la historio de la lingvo estas nedisigebla de tiu de la popolo mem. Ĉi tiu popolo, la dakotoj, loĝas en la ebenejoj de nord-centra Usono kaj sud-centra Kanado, en la modernaj ŝtatoj/provinco de Suda kaj Norda Dakoto (al kiuj la popolo donis sian nomon), Nebraska, Minesoto, Montano, kaj Alberto (5). Estas nature ke en tiel vasta regiono la loka lingvo ne estas unuforma. Tial la dakota havas almenaŭ kvar (aŭ eĉ pli laŭ pluraj kalkuloj) dialektojn (kiuj vere estas pli-malpli apartaj lingvoj) (10). Tradicie oni disigas tiujn dialektojn en tri partojn laŭ varioj en la prononco de la unua litero en la nomo – *dakota*, *lakota*, kaj *nakota* (10). Tiu skemo estas enorma trosimpligo, sed ĉi tie mi pritraktos precipe la du dialektojn, por kiuj ĝi pli-malpli akcepteblas: la dakotan kaj la lakotan. La dakota estas la plej orienta dialekto, t.e. oni parolas ĝin plejparte en okcidenta Minesoto. Ĝi havas du dialektojn, la santian (*Isányathi*, *Santee*) kaj la sisitonan (*Sisithunwan*, *Sisseton*). La lakota siaflanke estas pli okcidenta, parolata en la du Dakotaj ŝtatoj kaj orienta Montano (10). Ĝiaj dialektoj estas tro multaj kaj komplikaj por listigi ekster faka kunteksto.

La vorto “Dakota” povas porti plurajn signifojn. Ĝi estas ofte uzata nomo por tuta etno kaj lingvo, kaj ankaŭ por la plej orienta tribo en tiu etno kaj ties dialekto. Plie ĝi fariĝis la nomo de iama usona teritorio poste disigita en du ŝtatoj – Norda kaj Suda Dakoto. Oni nun preferas la vorto “Dakota” por la tuta etno, ĉar la antaŭa nomo Sioux (angle [su]) estas originale insulto.

Ĉiuj dakotaj popoloj tre gravis en la historio de la rilatoj inter Usono kaj la indiĝenaj amerikanoj. Dum Usono pligrandiĝis okcidenten en la dekaŭa jarcento,

la Dakotoj estis unu el tiuj, kiuj plej obstine rezistis. La dakotoj estis la ĉefaj kontraŭbatalantoj de Usono en la “Indianaj Militoj” de la 1870aj jaroj, dum kiuj okazis la fama batalo de *Little Bighorn* kaj la masakro de *Wounded Knee* (11). Ĉe tiu lasta, usonaj soldatoj amase mortpafis senarmilajn indiĝenajn virojn, virinojn kaj infanojn venintajn al ili por kapitulaci (11). Dakotaj emi-nentuloj kiel *Red Cloud*, *Sitting Bull*, *Crazy Horse* kaj *Black Elk* fariĝis plej konataj indiĝenaj figuroj en usona historio. Ankaŭ ilia kulturo fariĝis simbola pri la tuta indiĝena kulturo de Nordameriko, kvankam en aliaj lokoj tiu kulturo estis tute malsama. Ekzemple tipioj, plumaj kapornamoj kaj bisonĉasado, kiujn oni nuntempe ligas al indiĝenaj amerikanoj ĝenerale,

estas karakterizaĵoj de la kulturo de la dakotoj kaj ties najbaroj (12).

Post la fino de la militoj, la usona registaro enfermis la dakotajn popolojn en rezervejoj sur la plej malfekundaj terenoj de la teritorio (11). Ili devis aparteni al la plej malalta tavolo de usona societo, sen la rajto voĉdoni, kaj kiel la ĉerokoj, estis devigataj forsendi siajn infanojn al la registaraj lernejoj, kie oni submetis ilin al diversaj specoj de mistraktado kaj mal-



El Vikimedia. Aŭtoro: *David F. Barry*, fotisto el Bismarck, Dakota Teritorio.

Fama foto de la Lakota ĉefo *Sitting Bull*. 1883.



< <https://tce-live2.s3.amazonaws.com/media/media/9ab83383-bb1c-4690-9f02-fbe5cfad2fc6.jpg> >


Tipio, tradicia dakota tendo.

permesis iliajn lingvojn (8). Nuntempe la lakota lingvo estas unu el la plej vaste parolataj indiĝenaj lingvoj en Usono, sed havas nur ĉ. 2 000 parolantojn (9). Dume ĝia orienta kuzo, la dakota lingvo, havas nur ĉ. 100 (9).

La denaina

Alia lingvo, kun iom malsimila historio, estas la denaina (*Dena'ina*, antaŭe *Tanaina*), el sudcentra, apudmara Alasko (9). Ĝi apartenas al la denea familio, sed estas la sola el tiuj lingvoj, kies teritorio rekte bordas la maron, ĉe la duoninsulo de *Kenai* kaj la flankoj de *Cook Inlet* (9). Pro tiu kaj eble aliaj kialoj, la Denaina estas iom aparta ol aliaj deneaj lingvoj de Alasko (4).

La kompara izoleco de ilia teritorio kaŭzis, ke la denainoj restis ekster la potenco de eŭropanoj multe pli longe ol aliaj indiĝenaj grupoj, ĝis lastatempe. Dum



http://web.kpc.alaska.edu/denaina/images/territory_images/map_images/denaina_language_map.jpg

Mapo de la denaina regiono, sudcentra Alasko.

la dekoka jarcento ili estis vizitataj de eŭropaj vojaĝantoj kaj ricevis eŭropajn varojn per komerco kun aliaj triboj, sed ankoraŭ regis sian propran teritorion ĝis la alveno de la rusa imperio en la 1780-aj jaroj. (4)

La rusoj en Nordameriko regis vastan teritorion sed ne faris intensajn provojn alproprigi ĝin. Malmultaj rusoj venis al Alasko, precipe nur misiistaj pastroj, kiuj konvertis la lokanojn al la ortodoksa kredo; vojaĝantaj komercistoj, kaj multe pli malfrue kelkaj t. n. "malhovritanoj," kiuj venis por povi senĝene praktiki sian religion, malpermesatan en Rusujo mem. (4) Tamen la rusa imperio ja havis sufiĉe fortan efikon sur la denainojn, kiuj komencis amase morti pro eŭropdevenaj epidemioj. La malsano estis tiel katastrofa, ke ĉirkaŭ duono de la denaina popolo formortis, kaj la restintoj suferis krizon en sia tradicia mondkoncepto, pro kio multegaj konvertiĝis al la rusa



< <https://images.oca.org/parishes/v-1350588086/oca-ak-eklsnc.jpg> >

St. Nikolao Ortodoksa Preĝejo, Eklutna, konstruita en la rusa epoko.

ortodoksismo kiel eskapo (13). La denaina lingvo ankoraŭ montras grandan influon el la rusa kaj la slavona (4).

En la deknaŭa jarcento Rusujo forendis sian teritorion en Alasko al Usono, kaj oni komencis pli forte senti kolonian influon en la regiono (4). Fabrikoj estis konstruitaj por enladigi pektenojn kaj pretigi fiŝojn por forsendo al usonaj merkatoj (4). Kiel ĉiam, indiĝenaj gepatroj devis forlasi siajn infanojn por ke tiuj iru al la indianaj lernejoj, kiuj komencis tre rapide estingi la uzadon de la denaina lingvo (8). Pli malfrue grandaj rezervoj da petrolo malkovriĝis proksime, kaj la eŭropdevena loĝantaro eksplode kreskis. La urbo de Anchorage, en la mezo de denaina teritorio, fariĝis la plej granda urbo de Alasko, kaj pluraj aliaj urboj kreskis en la ĉirkaŭaĵo. Tio signifas, ke la denainoj estis preskaŭ tute inunditaj de ondo da blankaj ekloĝantoj. Nuntempe, kvankam Alaskaj lingvoj tendencas esti pli fortaj ol tiuj de la sudaj ŝtatoj, la denainan parolas nur ĉ. 90 homoj, ĉiuj maljunaj (9).

La meĥanismoj de lingvoperdo

Kerna faktoro por la sorto de iu ajn lingvo estas “lingva ideologio” – t.e. la sinteno de la ĝenerala komunumo, kaj parolantoj kaj neparolantoj, koncerne la lingvon (14). En Usono la reganta ideologio estas tio, ke ĉiu lingvo krom la angla estas “fremda” aŭ “neusona.” Tial paroli ilin denaske estas taŭge por eksterlandanoj, sed ne tute por usonanoj, kaj lerni ilin estas foje taksata malŝparo de tempo kaj de peno.

Multaj usonanoj (kaj ankaŭ neusonanoj) kredas, tute kontraŭfakte, ke antaŭ ol alvenis eŭropanoj la amerikanoj parolis nur unu lingvon, ke iliaj lingvoj estas tute malaperintaj, aŭ ke temas nur pri “dialektoj” malpli kompletaj aŭ esprimovaj ol la eŭropaj lingvoj. Kiel jam montrite, la vero estas, ke oni parolis milojn da lingvoj en la antaŭkolumba ameriko, kaj daŭre parolas centojn en la postkolumba; kaj ke amerikaj lingvoj estas almenaŭ tiom esprimovaj, kiom la eŭropaj, kaj eĉ pli gramatike komplikaj.

Sed ideologio efikas al la mondo sendepende, ĉu ĝi pravas aŭ ne. Pro la malfavora sinteno al indiĝenaj lingvoj kiun la ĉirkaŭa socio subtenis kaj subtenas, multaj komunumoj daŭre alfrontas nekomprenon kaj eĉ malamikecon rilate siajn lingvojn (kaj ankaŭ alirilite, ĉar la usona socio restas sufiĉe rasisma). Cetere ili mem, precipe la generacio de la indianaj lernejoj, ofte malalte aprezas siajn lingvojn, kaj konsentas kun la ĉirkaŭa ideologio (14). Tiu sinteno kutime ekzistas kune kun malalta aprezo de la indiĝena popolo, kaj eĉ de si mem. En tia stato, indiĝenaj komunumoj ofte suferas gravan lingvoperdon, kune kun aliaj problemoj sekvantaj el la malfavoro de la ĉirkaŭa socio. Indiĝenaj komunumoj en Usono alfrontas multe pli altan gradon de malriĉeco, krimo, drogdependeco kaj sinmortigo. Tiuj ĉi problemoj ofte venas kune kun lingvoperdo (14).

Lingvosciencistoj konstatas tri-generacian ŝablonon en la malapero de lingvo. Unuan generacion, flue parolantan la lingvon kiel sian unuan kaj gepatran, postsekvas dua generacio, kiu lernas la indiĝenan kaj la hegemonian lingvojn samtempe kaj uzas la du lingvojn en malsamaj okazoj, kaj tiu dua cedas al tria generacio, kies hejma kaj plej komforta lingvo estas la hegemonia (15). Ofte oni rimarkas, ke membroj de la dua generacio interparolas indiĝene kun siaj gepatroj, dum triageneracianoj, kiam oni alparolas ilin indiĝene, komprenas sed respondas per la hegemonia lingvo (15). La generacio venanta post ili kutime tute ne parolas la indiĝenan lingvon.

Traŭmataj praktikoj kiel la Indianaj lernejoj povas tamen enkonduki du-generacian ŝablonon, laŭ kiu ties lernintoj, kvankam ili lernis unue la indiĝenan lingvon, edukas siajn infanojn nur per la hegemonia, ĉar ili ne plu volas uzi la indiĝenan lingvon post la traŭmataj spertoj, kiujn ili ligas al ĝi en siaj memoroj. En multaj kazoj, indiĝenaj lingvoj preskaŭ tute

malaperis en tre mallonga tempo kaj nun havas malmultajn aŭ neniujn parolantojn.

Sed en iuj kazoj povas esti ĝi situacio de stabila plurlingvismo, en kiu ambaŭ lingvoj transdoniĝas de generacio al generacio sen perdo aŭ velko de unu aŭ la alia (15). En Latinameriko tiu situacio ekzistas en multaj lokoj, ekzemple en Paragvajo, kie la gvarania lingvo estas egale vaste parolata kiel la hispana (kaj taksata simbolo de paragvaja nacieco).

En Nordameriko la afero tamen kutime estas alia. En Usono regas tre forta ideologio favore al unulingvismo, kaj oni ofte malprave kredas, ke infanoj dulingve edukataj mense evoluas malpli rapide ol unulingvanoj kaj ne sukcesas tute regi ajnan lingvon (16). Ja ekzistas kelkaj kazoj de stabila dulingveco en usonaj kaj kanadaj komunumoj, sed eĉ ili estas nun minacataj (kiel ankaŭ en Latinameriko) pro la kreskanta bezono por vivstilo pli kaj pli konektita al la dominanta kulturo (2).

En la lastaj tempoj ĉi tiu situacio tamen komencas ŝanĝiĝi. Ekde la lastaj jardekoj, multaj grupoj aperis, kiuj subtenas la rajtojn de indiĝenoj kun atento al lingvoj. Unu el la celoj de ĉi tiu movado estis fierigi indiĝenojn pri siaj heredaj lingvoj kaj vivteni tiujn lingvojn kontraŭ la mortigaj premoj, kiujn ili alfrontas. Nuntempe estas kreskanta movado kaj en Usono kaj tutmonde, kiu celas plifortigi kaj eĉ “revivigi” indiĝenajn kaj endanĝerigitajn lingvojn.

Revigligado

La movado plifortigi indiĝenajn aŭ minoritatajn lingvojn estas tutmonda fenomeno, sed ĝia karaktero diversas laŭ lokaj situacioj. En Eŭropo lingvovigligado kutime restas sub la administro de regionaj registaroj, kiel en Kimrujo, Katalunujo ktp, aŭ de naciaj registaroj, kiel en Irlando. En Usono la afero estas alia. Multaj indiĝenaj triboj havas certagradan suverenecon en siaj rezervejoj, kaj tial ili mem estas respondecaj pri siaj lingvoj, foje kun la subteno de universitatoj, ŝtataj registaroj aŭ neprofitcelaj organizoj; sed tribaj instancoj kutime estas malriĉaj, kaj eĉ kun helpo ne havas multe da rimedoj.

Pluraj revigligaj projektoj en la mondo estas atingintaj ioman sukceson ligante la koncernan lingvon al sento de nacia aŭ regiona identeco. Tio ĉi okazis ekzemple en Kornvalo aŭ en Nov-Zelando, kie la maoria lingvo fariĝas grava parto de la Nov-Zelanda nacieco, eĉ por nemaorioj. En Usono tio kutime ne okazas (krom eble en Havajo, ĝis nun la plej sukcesa revigligo en la lando), pro pluraj kialoj. Indiĝenaj triboj kutime estas malgrandaj kaj disaj. Pro sia historio de subpremado ili sentas sin apartigitaj de la ĉirkaŭa blankula socio, kaj, kiel supre menciite, ankoraŭ regas ideologio, laŭ kiu indiĝenaj lingvoj kaj eĉ popoloj tute malaperis.

Ekaperas tamen kelkaj sukcesoj. En Masaĉuseco la Ŭampanoaga lingvo (*Wampanoag, Massachusetts*), antaŭe deklarita “morta,” nun havas denove manplenon da denaskaj parolantoj. La samo direblas ankaŭ pri la Juĉia lingvo (*Yuchi / Euchee*) en Oklahomo. En tiuj ĉi kaj aliaj projektoj oni uzas diversajn strategiojn por instrui la lingvon al novaj parolantoj. En kelkaj kazoj, kiam la komunumo estas forta kaj ekzistas fluparolantoj kapablaj instrui, oni starigas kursojn kun mergiĝo en la bazlernejo por junaj infanoj, kiuj plej rapide kapablas lerni. Povas tamen esti administraj baroj al tiaj programoj, kaj ofte la flua parolantoj de la lingvo ne povas aŭ ne volas instrui la lingvon al klasĉambro plena de infanoj. Ĉi-kaze oni ofte starigas programon de para lernado, en kiu oni parigas ĉiun lernanton kun fluparolanto, kaj tiuj pasigas kiel eble plej ofte sian tempon kune, parolante laŭeble nur en la indiĝena lingvo. Kiam lernantoj ekregas la lingvon laŭ tiuj aŭ aliaj metodoj, ili povas eduki siajn infanojn per la indiĝena lingvo, tiel kreante novan generacion da denaskaj parolantoj.

Sed revigligado mem povas enkonduki novajn problemojn. Por instrui la lingvon, kutime necesas skribsistemo, kiu en multaj kazoj tute ne ekzistas por indiĝenaj lingvoj. Necessas ankaŭ elekti inter multaj dialektoj la instruotan lingvoformon. Tio povas okazigi gravajn konfliktojn inter grupoj, aparte ĉe la ortografia normigado (bona ekzemplo estas la Kiova lingvo (*Kiowa*) en Oklahomo (17)). Plurfoje okazis konfliktoj inter grupoj ene de la popolo aŭ kun lingvosciencistoj – konfliktoj kiuj grave minacas la sukcespotencialon de projekto. Por tio ankoraŭ ne ekzistas klara solvo.

Konkludo

La mondo nur tre lastatempe ekkonsciis pri la valoro de indiĝenaj lingvoj. Kiel ĉi tiu artikolo strebas klarigi, tiu konscio jam venis tro malfrue por savi multajn indiĝenajn lingvojn kaj ties parolantojn el profunde terura sorto. Ni ankoraŭ ne povas scii, ĉu ĝi venis sufiĉe frue por evitigi similan sorton al tiuj, kiuj restas. Usono estis unu el la unuaj lokoj de grandskalaj kontakto kaj konflikto inter la moderna okcidenta socio kaj indiĝenaj popoloj, kaj ankaŭ de multaj el la plej teruraj agoj en tiu konflikto. Sed ĝi estas ankaŭ unu el la lokoj, kie konscio pri indiĝenaj lingvoj kaj deziro plivigligi ilin plej frue aperis. Do, se estas espero por indiĝenaj lingvoj, denove Usono estas unu el la lokoj, el kie ni atendu ĝin.

Sed tia espero devas nepre esti tutmonda. La historioj de lingva subpremado estas sufiĉe similaj en aliaj landoj tra la mondo, kaj estas evidente, ke la movado favore al indiĝenaj lingvoj venas el ĉie en la mondo. Tial ĝi devas interesi ankaŭ esperantistojn, kiel anojn de movado konscia pri la rolo de lingvoj en interhoma kaj interpopola justeco.


WDN

Fontoj

1. Ryan, Camille. *Language Use in the United States: 2011: American Community Survey Reports*. Vaŝingtono: U.S. Census Bureau, 2013.
2. Silver, Shirley, & Wick R. Miller. *American Indian Languages: Cultural and Social Contexts*. Tucson: University of Arizona Press, 1997.
3. Campbell, Lyle. *American Indian Languages: The Historical Linguistics of Native America*. New York: Oxford University Press, 1997.
4. Kari, James, James A. Fall, & Shem Pete. *Shem Pete's Alaska: The Territory of the Upper Cook Inlet Dena'ina*. Fairbanks: University of Alaska Press, 2003.
5. Rood, David S., & Allan R. Taylor. “Sketch of Lakhotia, a Siouan Language.” En: Goddard, Ives, red.: *Handbook of North American Indians, Volume 17: Languages*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1996.
6. Prucha, Francis Paul. “United States Indian Policies, 1815 – 1860.” En: Washburn, Wilcomb E., red. *Handbook of North American Indians, Volume 4: History of Indian-White Relations*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1988.
7. Cushman, Ellen. *The Cherokee Syllabary: Writing the People's Perseverance*. Norman: University of Oklahoma Press, 2011.
8. Szasz, Margaret Connell, & Ryan, Carmelita S. “American Indian Education.” En: Washburn, Wilcomb E., red. *Handbook of North American Indians, Volume 4: History of Indian-White Relations*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1988.
9. Ethnologue <www.ethnologue.com>
10. Parks, Douglas R., & Raymond J. Demallie. “Sioux, Assiniboine, and Stoney Dialects: A Classification.” En: *Anthropological Linguistics*, 34:1/4 (1992). pp. 233 – 255.
11. Utley, Robert M. “Indian-United States Military Situation, 1848 – 1891.” En: Washburn, Wilcomb E., red. *Handbook of North American Indians, Volume 4: History of Indian-White Relations*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1988.
12. Green, Rayna. “The Indian in Popular American Culture.” En: Washburn, Wilcomb E., red. *Handbook of North American Indians, Volume 4: History of Indian-White Relations*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1988.
13. Boraas, Alan. *An Introduction to Dena'ina Grammar: The Kenai (Outer Inlet) Dialect*. Soldotna: Kenai Peninsula College, 2009.
14. Field, Margaret C., and Paul V. Kroskrity. “Introduction: Revealing Native American Language Ideologies.” En: Kroskrity, Paul V., and Margaret C. Field, red. *Native American Language Ideologies: Beliefs, Practices, and Struggles in Indian Country*. Tucson: University of Arizona Press, 2009.
15. Nettle, Daniel, & Suzanne Romaine. *Vanishing Voices: The Extinction of the World's Languages*. Oxford: Oxford University Press, 2000. Berkhofer, Robert F., Jr. “White Conceptions of Indians.” En: Washburn, Wilcomb E., red. *Handbook of North American Indians, Volume 4: History of Indian-White Relations*. Vaŝingtono: Smithsonian Institution, 1988.
16. Bialystock, Ellen. “Consequences of Bilingualism for Cognitive Development.” En: de Groot, A. M. B., red. *Handbook of Bilingualism*. Cary: Oxford University Press, USA, 2005.
17. Neely, Amber A., & Gus Palmer, Jr. “Which Way Is the Kiowa Way? Orthography Choices, Ideologies, and Language Renewal.” En: Kroskrity, Paul V., and Margaret C. Field, red. *Native American Language Ideologies: Beliefs, Practices, and Struggles in Indian Country*. Tucson: University of Arizona Press, 2009.

1968, oficiala startpunkto: la skriba normo-lingvo de la eŭska (*euskara batua*)

Sed mi vin, lingvon arbaran, volas vin ĉienajna,
levita perflugiloj de la sci', maljuna la korp', la strebo nova,
kun flaviĝanta haŭto, porĉiama medol'.
(*Xabier Lizardi* 1931)



Adapto de mapo el Vikipedio (aŭtoro *Zorion*) al Esperanto.

1. Skiza enkonduko pri la eŭska lingvo kaj dialektoj

La plej akceptataj akademiaj teorioj asertas, ke la areo de la eŭska lingvo etendiĝis dum la antaŭromia epoko ambaŭflanke de la centra kaj okcidenta Pireneoj. Nordflanke, de Bordojo ĝis Tuluzo, sude de la Garona rivero verŝajne oni parolis akvitane, en lingvo parenca al la eŭska, aŭ eĉ dialektaro de la eŭskakvitana lingvo. En la Iberia Duoninsulo oni parolis ĝin ekde okcidente de Bilbao ĝis Andoro. Pri la plej suda rando, la rivero Ebro ne agis kiel regula limo por tiu lingvo, ĉar abundaj atestoj pri uzo de la eŭska troveblas en kelkaj valoj de Rioĥo kaj Kastilio ĝis la mezepoko.

Malgraŭ diversaj hipotezoj, ke la eŭska lingvo ligiĝas kun la iberaj, tamazihtaj aŭ kartvelaj lingvoj, oni ĝis nun ne pruvis sufiĉan rilaton de ĝi kun iu ajn lingvofamilio.

La eŭska ne apartenas al la hindeŭropa familio, tamen ĝi estis kaj estas forte influita de ĉiuj lingvoj, kiuj laŭlonge de la historio najbaris al ĝi, nome la keltaj, la latina, la okcitana, la hispana kaj la franca.

La dialektoj, nomataj *euskalkiak* aŭ [eŭskalkiak], nombras inter 5 kaj 8, tial ke eĉ plej granda specialisto pri tiu fako, *L. L. Bonaparte* ofte ŝanĝis konsideron pri la parolmaniero de kelkaj areoj, kaj unuigis aŭ apartigis lokajn variaĵojn surbaze de novaj malkovraĵoj.

El tiuj dialektoj, du, nome, la biskaja aŭ okcidenta kaj la suberoa aŭ plej orienta, estas sufiĉe apartaj. La aliaj tri-kvar, t.e. gipuska, altnafara kaj lapur-

da/basnafara (nomataj ankaŭ centraj) estas sufiĉe proksimaj, spite al supraĵaj malsamecoj.

Krom tre nestabilaj spertoj dum 1905 kaj 1932-1937, la eŭska lingvo havis neniun lokon en la edukaj sistemoj, respektive dependaj de Hispanio kaj Francio, ĝis la 1960aj jaroj. Konsekvence, la parolantoj de la eŭska ĉiam lernis skribi kaj legi france aŭ hispane; tiu fakto malfaciligas la interkomprenon inter parolantoj de malsamaj lokaj lingvaĵoj, eĉ se tiuj estas sufiĉe proksimaj.

Krom unu jaro dum la hispana intercivitana milito (1936-37) la eŭska lingvo havis neniun rolon en la skribaj dokumentoj de publikaj administracioj laŭlonge de la historio (absolute neniam, eĉ ene de la


mezepoka nafara regno) ĝis la 80aj jaroj, kiam ĝi oficialiĝis en la teritorioj de Alavo, Biskajo, Gipusko, kaj parto de Nafaro, norde de la Pireneoj, ĝi ankoraŭ ne estas oficiala.

2. Kial 1968?

Oktobre de 1968, en la franciskana sanktejo de Arantzazu okazis kunsido de la Akademio de la Eŭska Lingvo, *Euskaltzaindia* kadre de ĝia 50-jara datreveno. La plej grava plenumenda tasko dum tiu kunsido estis prezento, diskuto kaj aprobo de raporto fare de la lingvisto *Koldo Mitxelena* pri ortografio, uzo de la litero H, leksikaj variaĵoj kaj la deklinacia tabelo.

Akademianoj konsentis kun la raporto, tamen, ne ĉiuj, kaj tial, en kverela etoso, ekis la definitiva projekto pri la eŭska norma lingvo.

Ĉiukaze al tiu celo jam delonge sopiris kaj impulsis fasko da intelektuloj kaj verkistoj tra la jarcentoj. Normo-starigo, do, ŝuldiĝas al sukcesa kulmino de ege-ege longa kaj kolektiva procezo.



El Vikimedia: Franca Nacia Biblioteko.

Linguae Vasconum Primitiae

Paĝo el la poemaro de la basnafara pastro, *Bernat Etxepare*, aperinta en Bordojo en la jaro 1545.



Mapo adaptatita el vikimedia mapo.

La eŭskaj dialektoj.

3. 1545: *Linguae Vasconum Primitiae*. neskribebbla, tamen skribita

Spite al la fakto, ke la eŭska estis parolata de praa epoko ĉirkaŭ la okcidentaj Pireneoj, skribaj spuroj malabundas ĝis la dekseka jarcento. Kelkdek nomoj de personoj legeblas sur tomboŝtonoj de la malfrua romia epoko. Mezepoke oni povas trovi centojn, eĉ milojn da eŭskaj nomoj de lokoj kaj personoj ene de latinaj aŭ latinidaj dokumentoj.

Samkiel ĉie en okcidenta Eŭropo, la unua administracia skriba lingvo de la nafara regno estis la latina, kaj ekde la 13a jarcento okazis transiro al la latinidaj okcitana, nafar-aragona kaj kastilia. Nur kelkaj eŭsklingvaj linioj enŝoviĝis en privatajn leterojn dum tiu vasta periodo.

La basnafara katolika pastro *Bernat Etxepare* rompis tiun silenton per kolekto de 15 poemoj, presita kaj eldonita en Bordojo en 1545. La aŭtoro reliefigas per la latinlingva titolo, nome *Linguae Vasconum Primitiae*, tiun fakton, ke ĝi ja estas la unua libro verkita en la eŭska. Ankaŭ li substrekas, ke «tiujn versojn mi verkis laŭ mia nescio» kaj aldone verse rekte mencias «*Berce gendec usteçuten ecin skriba çaiteyen, oray dute phorogatu enganatu cirela*» (Aliaj homoj pensis, ke ne eblas skribi ĝin; de nun ili konstatas ke ili estis trompitaj). Pere de ĉi libro, do, forfalis tiu fuŝa kaj peza antaŭjuĝo.

Al tiuj versoj ne mankas kvalito, vervo kaj beleco, kvankam ili estas verkitaj laŭ ia nescio (aŭ simple, kuraĝo, miaopinio). Ankaŭ amoro-krudecon enhavas tiu komencepoka libreto.

Rilate la elektitan lingvon, ni trovas ellaboritan lingvaĵon (kvazaŭ ne estus la unua verkita libro), klaran montron de la loka dialekto de la valo, kie vivis *Etxepare*, nome, *Garazi*, valo proksima al Roncevalo, grava trapasejo ĉe la jakobea vojo al Santiago, ene de la ankoraŭ sendependa regno Nafaro.

Por la enkonduko de la eŭska en la literaturon *Etxepare* utiligis popolan modelon de lingvo, kiu enhavas kelkajn arĥaismojn, influon de la okcitana

kaj novan vokal-traktadon post la vokaloj *e* kaj *u*, kiu poste rapide disvastiĝis al najbaraj regionoj. Se paroli pri la skribsistemo, la basnafarano uzis baze la francan.



El Vikimedio.

La Nova Testamento tradukita de pastoroj sub la gvidado de *Ioannes Leizarraga*.

Tiel ĉi unuafoje perlitere vestiĝis senprestiĝa kaj laŭaspekte ekzota lingvo, sen konataj parencoj kaj kompreneble sen normo kiel celo. Tiu “primico” estis entuziasma iniciato de verkisto, kiu konscias pri la profundeco de la defio: «*Heuscara ialgui hadi plaçara*» (Eŭska lingvo, surplacen venu vi). Tiu afabla invito plurajn verkistojn venigis al la komuna tasko konstrui literaturon kaj skriban lingvon.

2. 1729: La nevenkebla venkita


Depost la unua, laŭvice alvenadas sinsekve novaj eroj “surplacen”. Manskribitan ĉ. 1567-1600, oni malkovris en Madrido komence de la 21a jarcento amrakonton de ŝafista etoso, kun la titolo “*Dianeia & Koplak*”, verkitan de la alavano *J. Pérez de Lazarraga* en sia loka okcidenta dialekto.

Multe pli seriozan, altcelan agadon gvidis, mendis kaj pagis la nafara reĝino *Ioanna de Albret*. Post sia konvertiĝo al kalvinismo ŝi komisiis al la pastoro *Ioannes Leizarraga* la tradukon de la Nova Testamento en la eŭskan. Tiu libro estis eldonita en 1571. *Leizarraga* tre diligente plenumis tiun postuleman taskon; ĉirkaŭ si li konsistigis areton de pastoroj de malsamaj nordpireneaj regionoj, kaj transpasis la tendencon al uzado de loka lingvaĵo.

La rezulto de tiu komuna laboro estas fascina. Laŭ kelkaj lingvistoj kaj verkistoj ni staras antaŭ «la plej eksterordinara monumento iam ajn verkita en la eŭska». Fakte el lingva vidpunkto estas ĝi mirinda kaj rava majstroverko, kiu spegulas samnivele, precize, nuancprovize kaj profunde la latinan originalon. Tiu meritega agado, tamen, ne sukcesis atingi la publikon, ĉar kelkajn jarojn poste la regno iĝis denove katolika, kaj tiu verko estis herezaĵo de la hugenota periodo.

Aliflanke, per tiu libro oni konstruis modelon de lingvo eble tro ellaboritan kaj altnivelan, iom for de la parolmaniero de la popolo (ekz. tro da latinismoj, vasta uzado de la subjunktivo kiel en la praa lingvo, aŭ konstanta ciumado). Ĉiuokaze ĝi staras fiere kaj altrange kiel unu el plej puraj fontoj por esploro de la sintakso kaj morfologio de la lingvo. Eĉ pli, ĉ. 1950/60 areto de junaj verkistoj favore proponis tiun modelon de Leizarraga kiel bazon por la norma lingvo.

Dum la 17a jarcento aperas sufiĉe grandkvanta eldono de libroj en la eŭska, ĉefe norde de la Pireneoj, plejparte pritraktantaj katolikan temaron. Ĉirkaŭ la pastro *Pedro Axular* (Aŝular/Acular) arigis grupo de pastroj kaj monaĥoj, kiuj teksis komunan lingvostilon surbaze de la lapurda lingvaĵo de la areo Ziburu-Sara, proksime al la regnolima marbordo. *Axular* studis en Salamanko, kaj certe en tiu kastilia universitato li ko-



El Vikimedio. Aŭtoro: *Euskaldunaa*

Portreto imagita de *Pedro Azular* (1556-1644).

EL IMPOSSIBLE VENCIDO.

ARTE

DE LA LENGUA

BASCONGADA.

SU AUTHOR

EL P. MANUEL DE LARRAMENDI

de la Compañia de J.esus, Maestro
de Theologia de su Real Colegio
de Salamanca.

La nevenkebla venkita. Arto de la eŭska lingvo.

nis parolantojn de diversaj dialektoj. La lingvostilo de la t. n. Skolo de *Sxxa* estas eleganta, klara, fleksebla kaj bele bunta, aldone komprenebla por parolantoj de la aliaj centraj dialektoj. Ĝi ja stariĝis kiel unua praktika formo de unuigita skriba modelo, kiu poste estos konsiderata kiel klasika literaturo, kaj sukcese efikis por legantoj kaj verkistoj. Altkonsidere al la elstara stilkvalito de lia verko oni nomis *Anular* "la princo de la eŭskaj belektroj".

Aliflanke pli kaj pli da verkistoj ekaperigas librojn laŭ siaj propraj dialektoj. Dum la 18a jarcento la gipuska (centra) dialekto rolas avangarde je la eldono de la eŭska literaturo. La jezuito *Manuel Larramendi* ne malmulte kontribuis tiusence. Li tre malmulte verkis en la eŭska, sed ja vigle instigis, en la hispana, favore kaj apologie al la eŭska. Li verkis eŭsk-latin-hispanan vortaregon kaj la unuan eŭskan gramatikon sub ĉi sugesta titolo: "La nevenkebla venkita. Arto pri la eŭska lingvo" (*El imposible vencido. Arte de la Lengua Bascongada*). En ĝi la aŭtoro detale prezentas prononcon, deklinacion, helpajn verbojn kaj aliajn elementojn de la sintakso, ne nur de sia gipuska dialekto, sed ankaŭ de la biskajaj kaj lapurda. Kvankam *Larramendi* tre malmulte verkis eŭske, pere de sia enorma laboro li skuis tiun malagemon rilate la eŭskan kaj fiere defendis ĝin antaŭ multflankaj kritikoj.

2. 19a jarcento: W. von Humboldt, L. L. Bonaparte, Alzikebe, Abadia, S. Arana. la revivigliĝo

Inter 1799 kaj 1801 la grava prusa intelektulo *Wilhelm von Humboldt* vizitis kelkajn eŭskajn teritoriojn kaj ekesploris pri tieaj leĝoj, kulturo kaj... lingvo. Lintiel ravis la eŭska lingvo, ke post reveno al Prusio li ĝin prezentis en universitata medio

rimarkigante ĝiajn trajtojn kaj unikecon kaj estigante kreskantan intereson pri la eŭska kiel esplorinda fako. Samtempe li kontaktiĝis kun biskajaj verkistoj kiel *Astarloa* aŭ *Moguel*.

Tiu intereso, tamen, ne kunportis puŝon al starigo de skriba norma lingvo. Proponoj pri unuigo de skribmanieroj aperis nur dum la 19a jarcento. Eble la romantika epoko pli serĉis originalaĵojn kaj ekzotikajn trajtojn ol regulojn kaj normojn. Ĉi-koncerne la eŭska literaturo havis grandan disvolviĝon en pluraj lokaj variaĵoj, sed la afero pri la normo-lingvo restis stagna.

Gravan rolon ludis ĉi-rilate *Louis L. Bonaparte*, brita lingvisto, nevo de Napoleono. Li profunde trastudis kaj esploris ĉiujn lokajn variaĵojn de la lingvo. Danke al lia sindediĉo, ni bone konas ĉiujn tiamaĵojn (kelkajn ne plu vivantajn).

Post la venko de la franca revolucio, kaj poste de la hispanaj liberaluloj, frustracia sento invadis la eŭskeman medion de la 19a jarcento ambaŭflanke de la Pireneoj: forigo kaj malpermeso de multaj propraj leĝoj, malaperigo de la nafara regno en la hispanan kronon, amasa elmigrado al Ameriko... En tiu malluma etoso, tamen, ekis novaj iniciatoj por eligi la eŭskan kulturon el ĝia margena situacio.

Anton Abadia, suberoano naskiĝinta en Dublino, forte skuis la tiam deprimiĝantajn eŭskemulojn pere de la Floraj Ludoj, grava kultura evento, kiun li aranĝis por montri kaj prestiĝigi la eŭskajn lingvon kaj kutimojn. Jen okul- kaj cerbofrapa titolo de la poezia



Wilhelm von Humboldt

verko premiita en 1879: “*Ama Euskeriari azken agurrak*” (Adiaŭo al patrino Eŭska Lingvo). Amara sento de malvenko kaj senespero ĉeestas en tiu poemo verkita en belega biskaja dialekto.

Notindas, ke *Humboldt* komence de la 19a jarcento kaj *Miguel de Unamuno* komence de la 20a jam profetis pri la forpaso de la lingvo post cent jaroj.

Same meze de la 19a jarcento, multe pli pozitive kaj praktike reagis la ne tro konata gipuska verkisto *J.F. Aizkibel*, kiu rekte kaj klare proponis ĉ.1853 jenon: «Oni formu Akademion kun la plej kleraj homoj de la eŭska lando, kaj hispanoj kaj francoj, ĉar ĝi ja estas ege bezonata por la antaŭeniro de nia lingvo. Kaj kun tempopaso, post modifo de la prononcaj kaj ortografiaj malsimilaĵoj, per ĝeneraligo de la voĉoj de la diversaj dialektoj, formiĝu komuna lingvo, komprenebla por ĉiuj provincoj».



Sabino Arana-Goiri.

Fine de la 19a jarcento *Sabino Arana-Goiri* fondis EAJ-PNV, la eŭskan naciisman partion, sub la devizo “Eŭskio estas la patrio de ĉiuj eŭskoj”. *Arana-Goiri* mem, naskiĝinta en Bilbao, ne estis denaska eŭskparlanto, sed li lernis la lingvon laŭ la biskaja dialekto junaĝe. Li vigle kaj konstante favoris la disvolviĝon kaj prestiĝon de la eŭska, tamen, tial ke lia politika vidpunkto pri la lando estis federalisma kaj “pureco-serĉa”, lia sinteno pri la unuigo de la normo-lingvo orientiĝis al la dialektoj kaj purismo: ĉiu



Akademianoj en 1927.

dialekto havu sian skriban normon, kun forpelo de la latinaj kaj latinidaj pruntaĵoj. La agado de *Arana-Goiri* rilate la lingvon iĝis multe pli influa kaj fruktodona pere de liaj disĉiploj, kiuj renovigis kaj preskaŭ Parnasen levis la eŭskan poezion inter 1920 kaj 1937.

2. La 19a jarcento: Akademio kaj unuiga venko

Sub la gvido de *Eusko Ikaskuntza* (Eŭska Studagado) kaj sub la aŭspicioj de la deputitaroj de Alavo, Biskajo, Gipusko kaj Nafaro, grupo de verkistoj kaj intelektuloj kreis en 1918 *Euskaltzaindia* (la Akademion de la eŭska lingvo). Memkompreneble, unu el la ĉefaj celoj estis iom-post-ioma starigo de normoj rilate ortografion, vortaron ktp. Ankaŭ prilaboro de projekto por la unuiga normo, sed la frukto ankoraŭ ne sufiĉe maturis por tiu enorma defio. En 1922, 15 membroj voĉdonis proponojn pri la unuiga lingvo kun jena disa rezulto: 5 membroj kontraŭis la unuigon; 4 favore la gipuskan; 2 favore kompletigan eŭskan surbaze de la gipuska; 2 favore kompletigan eŭskan surbaze de ĉiuj dialektoj; 1 favore la biskajan; 1 favore la “aŭtentikan eŭskan”.

Menciendas ke, krom pri la lingva modelo, la debato forte fokusiĝis al la celo kaj atingeblo de la norma lingvo. Kelkaj verkistoj klare opiniis pri la striktaj limoj de la utiligado de la unuigita lingvo: oni ne uzu ĝin, ankaŭ la dialektojn ne, por pritrakti superajn fakojn kaj sciencojn, nome filozofion, fizikon, teologion ktp. Kiel ekzemplo *Antonio M. Labaien*, grava teatro verkisto, opiniis, ke la eŭska havu kiel limon la t. n. fakojn “*quadrivium*”, t. e. bazajn sciencojn. Tiuj intelektuloj, malsaĝe kaj nekonscie pri la logikaj damaĝaj konsekvencoj de tiu aserto, disvastigis tiun teorion forĝitan de tipe kolonia pensmaniero, laŭ kiu kelkaj lingvoj kapablas esprimi kompleksajn pensojn kaj aliaj tutsimple ne. Aldone tiuj homoj ne kapablis antaŭvidi la alvenon de novaj rimedoj, kiuj tiam kaj nuntempe nepras por digna postvivo kaj evoluigo de lingvoj: radio, lernejsistemo, gazetoj, administracio, universitato!

Post la hispana intercivitana milito kaj la dua mondmilito, kelkaj junuloj eniris la Akademion. Temas pri kuraĝaj verkistoj kaj lingvistoj, kelkaj el ili ne katolikaj, ĉefe maldekstremaj, kiuj forte skuis la antaŭan bremsan tendencon kaj ĝisefektiviĝe alfrontis la komplikan taskon de la starigo de la norma lingvo kaj ties disvastigo: *Villasante*, *Mitxelena*, *Aresti* kaj *Txillardeg*i inter aliaj.

Al tiu ĉi grupo, al ĉiu membro gigante kontribuinta (beletro, konkretaj kaj praktikaj proponoj, estra agado ĉe la akademio...) ŝuldiĝas tiu modelo de lingvo, kiu akceptas latinidajn influojn kaj kelkajn neologismojn, bazita sur la centraj dialektoj, nome gipuska, altnafara kaj lapurda-basnafara, laŭ vortoj de *Txillardeg*i: «la triangulo *Oiartzun-Sara-Elizondo*», nome, proksimaj vilaĝoj kun tiuj tri dialektoj. Tiu normo bonvenigas

erojn de ĉiuj dialektoj, kaj multon prenas el la klasika literaturo, precipe el la deksepjarcenta Skolo de Sara.

De 1968 tiu strategia proceso vertiĝe akceliĝis: decidoj pri demonstrativoj, helpa verbo, vortordo, subordigitaj kaj kunordigitaj frazoj, pruntvortoj, elparolo, ciumado, kunmetitaj vortoj, interpunkciado... Samtempe revuoj, radioj, verkistoj, intruistoj, kantistoj, publikaj instancoj, novaj parolantoj ekutiligis iom post iom tiun proponitan modelon. Sekvis televido, universitato, interreto...

Plej tikla kaj konflikta decido estis la akcepto de la litero H, ankoraŭ uzata en la nordaj dialektoj kiel sono kaj kiel litero. Krom praktikaj kaj filologiaj kialoj, aldoniĝis ideologia konsidero, nome, konservemuloj taksis ĝin kiel simbolon de revolucio kaj kiel rompon kun la ĝistia tradicio. Tiun konsideron junaj agantoj ne neis, kaj la H-afero okazigis veran skismon. En 1978 grupo de kontraŭstarantoj, kelkaj el ili menciindaj verkistoj kaj bonegaj konantoj de la lingvo, kreis *Euskerazaintza*, alternativan akademion de la eŭska, kiu daŭre pledas por la uzado de dialektoj.

Spite al tiuj alternativuloj, la sukceso de la unuigita lingvo estas senprecedenca. Krom modlado de lingvomodelo praktika, riĉa kaj proksima al la uzado de pluraj parolantoj, la kreintoj ankaŭ trafe rigardis siatempe (en la 60aj jaroj) urĝon de tiu necesa ilo, ĉar la eŭska atingis en postaj jaroj ĝis tiam neimageblajn "pintojn": baz- kaj mezlernejojn, amaskomunikilojn, administracion, universitaton, interreton... Tiu grupo kiu starigis la normlingvon formis fortan bazon por la plena disvolviĝo kaj pluvivado de la eŭska, kaj realigis la revon de la poeto *Lizardi* en 1931, kiam multaj neis



Akademianoj. Arantzazu 1968.

ian superan spacon por minoritataj lingvoj: «Sed mi vin, lingvon arbaran, volas vin ĉienajna, levita per flugiloj de la sci', maljuna la korp', la strebo nova, kun flaviĝanta haŭto, porĉiama medol'».

Mi ne finu la artikolon sen menci la estontecon de la dialektoj. Kelkaj jam profetis pri ilia neevitebla malapero post kelkaj jardekoj. Miaopinie, la sorto de la dialektoj forte ligiĝas al tiu de la unuigita lingvo: se unu fortas, ankaŭ alia(j) fortos. Ili nutras sin reciproke. En la venontaj 50-60 jaroj neniel mi antaŭvidas malaperon de la nun vivantaj dialektoj. Kial? Simple ĉar daŭre oni transdonas ilin al naskiĝantaj infanoj ene de familioj en malsamaj dialekt-areoj; aliflanke kelkaj radistacioj dissendas ĉefe per dialektoj. Aldone lokaj variaĵoj nun ĝenerale estas respektataj en la lernejoj.

Nur demografiaj kialoj povas vere minaci la estontecon de la dialektoj. La unuigita lingvo ĉi-momente ne kunportas minacon.

RBA

Ekzemplo de konjugacio je la nuntempo en la diversaj dialektoj

Helpverbo aŭ verbo havi je la singularo kun rekta objekto.

UKAN/EDUN (NOR –NORK, DUT) VERBO NUNTEMPO.

Substrekitajn formojn oni elektis por la normolingvo.


BIZKAIA (OKCIDENTA)	GIPUSKA (CENTRA)	NAFARA (CENTRA)	LAPURDA BASNAFARA	ZUBEROA
DOT	DET	<u>DUT</u>	<u>DUT</u>	DŮT
DOK/N	DEK/N	<u>DUK/N</u>	<u>DUK/N</u>	DŮK/N
DAU	<u>DU</u>	<u>DU</u>	<u>DU</u>	DŮ
DOGU	DEGU	<u>DUGU</u>	<u>DUGU</u>	DŮGŮ
DOZU	DEZU	<u>DUZU</u>	<u>DUZU</u>	DŮZU
DOZUE	DEZUE	<u>DUZUE</u>	<u>DUZU(I)E</u>	DŮZIE
DABE	DU(T)E	<u>DUTE</u>	<u>DUTE</u>	DŮTE

Pli da formoj por DUTE, ekzemple, povas esti laŭ subdialekto: Dube, deue, debie, dai, dubie, die, deurie...

La kornvala pioniro de revivigitaj lingvoj


En multaj regionoj de la mondo ekzistas klopodoj revivigi minoritatajn (=malplimultajn) lingvojn. Por pripensi la eblecon de minoritatlingva revivigo, kiu devas komenciĝi de ege malfacila starpunkto, la ekzemplo de la kornvala, kelta lingvo en Kornvalo (*Kernow*), sudokcidenta duoninsulo de Britujo, estas interesa kazo. Nome tiu lingvo, kiu, pro la premo de la angla, antaŭ la fino de la 18a jarcento preskaŭ tute perdis denaskajn parolantojn, havas jam pli ol centjaran historion de

reviviga movado kaj tiel povas esti rigardata pioniro de minoritatlingva revivigo. Hodiaŭ oni supozas, ke la



Fond de carte: histgeo.ac-aix-marseille.fr.

Situo de Kornvalo en Britio.




D-ro Ken George prelegis en Sophia-Universitato en Tokio pri la kornvala lingvorevivigo.

lingvo havas kelkcent parolantojn pli-malpli fluajn.

Mi unuafoje vizitis Kornvalon en 1999 kaj tuj eksentis simpaton al tiu ĉi lingvo. Vizitante kelkajn aranĝojn de la lingva movado, mi sentis min iel “hejme” ... kiel esperantisto: ankaŭ ili havas lokajn kursojn kaj klubojn, kulturajn festivalojn kaj seminariojn. Malgraŭ la baza diferenco, ke la “interna ideo” de la kornvala estas pli nacia ol internacia, la kornvalan lingvo-komunumon oni povas imagi kvazaŭ iun lokan esperantujon, kiu memstare kaj izole ekzistas.

En majo 2018 mi havis la okazon intervjui d-ron *Ken George*, unu el la ĉefroluloj de la revivigo de la kornvala lingvo, okaze de lia vizito al Japanujo. Por pli bone kompreni la intervjumon, ĉi-sube mi unue skizas la bazan evoluon de la lingvo.

La procezo de la lingva revivigo el vidpunkto de lingva uzo kaj lingva ideologio	
Lingva uzo	Ideologio
Restantaj elementoj de la lingvo	
Publika ekapero de la lingvo (publikaĵoj, eventoj)	Ideo de lingvorevivigo
Kresko de lingvolerno kaj uzo (lingvaj kursoj, neformalaj renkontiĝoj)	Kresko de regiona konscio
Oficiala uzo	Politika agnosko
Reestabliĝo kiel regiona lingvo?	Publika konscio pri la lingvo



El Vikimedia. Aŭtoto: Joowwww.

Fonto: K. George, *Cornish*, in: M. Ball (eld.), (1993) *The Celtic Languages*.

La evoluo de la lingva limo en Kornvalo, de la kornvala ĝis la angla, 1300-1750.

Lingvon kiel socian fenomenon oni povas dividi en du elementojn: ili estas la reala uzo kaj la ideologio akompananta la lingvouzon (Kimura 2018). La evoluon de la kornvala lingvorevivigo ni povas kompreni kiel procezon de reciproka influado inter reala uzo kaj ideologio.

La bazon de lingvorevivigo donis la fakto, ke tra Kornvalo multaj loknomoj devenas el la kornvala lingvo, kaj ke aldone restis historiaj skribaĵoj en la malnova kornvala lingvo. El intereso al tiu lingva pasinteco ekaperis la ideo revivigi la kornvalan komence de la 20a jarcento. En 1904 publikiĝis la unua lernolibro, kiu prezentis la lingvon al samtempuloj. Post jaroj sekvis aliaj, pli praktikaj lernolibroj kaj aperis unuaj lernantoj. Kaj oni okazigis eventojn kiuj uzas la kornvalan kiel ritan lingvon. El

tiaj agadoj, kiuj montris Kornvalon kiel regionon kun aparta historia heredaĵo, precipe post la Dua Mondmilito kreskis regiona konscio pri tio, ke temas pri origine kelta regiono. Tia regiona konsciigo instigis pli multajn homojn lerni kaj uzi la lingvon en la jardekoj post la 1970aj. Oni komencis organizi kursojn kaj neformalajn renkontiĝojn por lernantoj kaj progresintaj uzantoj. Preskaŭ 100 jarojn post la publikigo de la unua lernolibro, la lingvo jam estis tiom revivigita, ke ĝi sukcesis en 2003 esti akceptita en la liston de protektindaj minoritataj lingvoj en Britujo. Tiu agnosko akcelis oficialan uzon de la lingvo, kvankam en modesta skalo. Se tia oficiala uzo, videbla precipe en dulingvaj publikaj signoj, kreskas, antaŭvideblas plia kresko de publika konsciigo de la lingvo, kiu povus, en ideala kazo, konduki al reestabliĝo kiel regiona lingvo uzata de certa proporcio de la loĝantoj. Videbla signo de la atingo de la lingvorevivigo estas, ke en 2010 la “mapo de endanĝerigitaj lingvoj en la mondo” de Unesko reklasifikis la statuson de la kornvala de “malaperinta” al “severe endanĝerigita”. Tio signifas, ke ĝi estis finfine agnoskita kiel vivanta lingvo.

Krom tiuj prilingvaj evoluoj notindas, ke kornvalanoj estis agnoskitaj kiel nacia malplimulto laŭ la Kadra Konvencio por la Protekto de Naciaj Minoritato en 2014. La lingva revivigo certe ludis kernan rolon en tiu akcepto. **KGC**

Esperantlingve legeblas pri la kornvala i. a.:


- Edmund Grimley Evans: Lingvorevivigo. La kornvala, *Monato*, jan. 1998, 23-24.
- Kimura Goro Christoph: La Kornvala – Pioniro de revivigitaj lingvoj, *Revuo Orienta* 8-9.2005, 14-15.
- Kimura Goro Christoph: La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj?, en: Detlev Blanke / Ulrich Lins (red.): “La arto labori kune”. Festlibro por Humphrey Tonkin, Rotterdam: UEA, 2010, 171-177.

- Uwe Joachim Moritz: “El la keltaj landoj”, *Etnismo* 62, 1997, 7-8.

- Geoffrey H. Sutton: “Konciza Historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo”, London, 1969.

Vidu ankaŭ:

- Kimura Goro Christoph: Lingvoideologia aliro: Ĉu Esperanto vere havas “internan ideon”?, en: Kiselmann, Oscar Christer; Corsetti, Renato; Dasgupta, Probal (red.): “Aliroj al Esperanto”, Dobřichovice: KAVA-PECH, 2018, 117-127.



El Vikimedia. Aŭtoro: Quartier Laton 1968.

Reproduktaĵo de la versoj de Origo Mundi, unua verko de la Ordinalia (granda verko de mezepoka kornvala literaturo), verkita de nekonata monaĥo fine de la 14a jarcento. La reproduktaĵo estis trovita sur paĝo de Kornvala Dramo verkita de Edwin Norris, 1859.

KIMURA Goro Christoph

Intervjuo kun d-ro Ken George, unu el la ĉefroluloj de la revivigo de la kornvala lingvo

Pri la intervjuito

D-ro Ken George, oceansciencisto kaj lingvisto, estas konata kiel proponinto de revivigita formo de la kornvala, Komuna Kornvala (*Kernewek Kemmyn*). Li verkis vortarojn kaj multajn prilingvajn studojn. En la lastaj jaroj li dediĉas sin al tradukado de kantoj en la kornvalan, ekzemple por la ĉiujara keltlingva kanta konkurso en Irlando, kie la kornvalaj grupoj gajnis jam ripetfoje. Kiel estro de esplora laborgrupo pri la kornvala, li ankaŭ organizas studkunvenojn pri la kornvala lingvo.



El Vikimedia. Howlsedhes Servoj kaj Chris Bowden fotisto. Uz: Mongvras.
D-ro Ken George, fotita en 2006.

La kornvala post oficiala agnosko

Kimura: En 2003 la revivigita kornvala lingvo atingis novan stadion en sia evoluo, per oficiala agnosko kiel minoritata lingvo laŭ la Eŭropa Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj. Kiel vi taksas la efikon de la oficiala agnosko?

George: Homoj tiam esperis, ke tio signifos grandan paŝon antaŭen por la reviviga movado. Sed fakte progreso venis malrapide kaj nur etskale. Tamen almenaŭ ni atingis tiun mejloŝtonon de oficiala agnosko. La lingvon oni ne plu rigardas kiel esoteran tempopasigilon de entuziasmoj.

Kvankam la lingvon daŭre vivtenas entuziasmoj, tiuj nun povas aserti, ke la lingvo estas oficiala, aŭ almenaŭ parte oficiala lingvo laŭ parto du de la Eŭropa Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj.

Multaj pensis, ke post la agnosko oni nomumos instruistojn, kiuj ĉirkaŭiros tra Kornvalo kaj instruas la lingvon vaste en lernejoj. Sed tiel ne okazis. La kornvala estas instruata en kelkaj lernejoj, sed kiel aldona fako ekster la kutima lernoplano. Estis kelkfoje provoj fondi infanvartejojn aŭ lernejojn, kiu uzu la kornvalan kiel agad- kaj instrulingvon. Sed la problemo estas, ke Kornvalo estas tiom longa lando, fakte 120km de oriento ĝis okcidento. Tial, por kolekti infanojn, kies gepatroj volas instruadon en la kornvala, ili devas ĉiutage veturi tre longe.

Aliflanke, danke al la oficiala agnosko, la Konsilio de Kornvalo alfrontis la premon, ke ĝi devus mem uzi kaj subteni la lingvon. La uzo fare de la Konsilio estas limigita, tamen. Se vi vizitas la oficejojn de la Konsilio, kelkaj oficistoj povas saluti kornvallingve. Sed ili ne povas paroli la lingvon. La lingvouzo estas simbola. Novaj oficejoj havas dulingvajn signojn, sed la malnovaj oficejoj de antaŭ la agnosko, ne.

Evidenta progreso okazis en la stratnomoj. Je ĉiu nova strato aŭ placo, kaj okaze de renovigo de ekzistantaj, la nomindikiloj devas esti dulingvaj. Kaj mi estas membro de laborgrupo, kiu decidas, kiu estas la plej taŭga formo en la kornvala. La indikiloj surhavas grandliteran anglan nomon kaj malpli grandan kornvalan (foto). Ekzistas 10000 stratoj en Kornvalo kaj ĝis nun dulingviĝis c. 1800, t.e. 18 %. Do, homoj jam komencas rimarki tion. Eble kiam la elecento atingos 25%, kelkaj komencos protesti: por kio vi faras tion ktp. Sed ja ne aldone kostas skribi indikilojn dulingve anstataŭ nur angle. Do, tio estas publike videbla signo de la kornvala.

La Konsilio donas 25000 pundojn jare por subteni la kornvalan lingvon. La brita registaro donadis 150000 pundojn jare, sed la nuna konservativa registaro ĉesigis tiun subtenon en 2016, kaj ni scias, kiu kulpas!

Notu, kiam Britoj voĉdonis por forlasi Eŭropan Union, plejmulto de la Kornvallingvanoj kontraŭis, ĉar ili konscias, ke la kornvala estas ne nur kelta lingvo, sed eŭropa minoritata lingvo. Kaj ili sentas sin eŭropanoj. Sed ŝajne la plimulto de la kornvalanoj ne tiel sentas, ĉar 56% voĉdonis por ekŝiĝo el EU. Kia granda honto! Por la kornvala lingvo, la ekŝiĝo signifos ankaŭ malpli da subteno.

Unu el la novaj evoluoj estas, ke en 2015 fondiĝis Kornvala Lingva Akademio, ligita kun la Konsilio. Ili nun faras lingvoplanadon. La menciita laborgrupo pri loknomoj estas unu el kvar laborgrupoj de la akademio. La aliaj laboras pri terminologio, vortaro kaj esplorado. Mi estas ankaŭ estro de tiu lasta laborgrupo. Antaŭe tian laboron faris revivigmovada organizo, kiu ankoraŭ ekzistas. La rilato inter la oficiala akademio kaj la movada organizo restas malklara. Oni ne povas servi al du mastroj. La Kornvala Akademio ankoraŭ ne sukcesis gajni sufiĉe da subteno kiel aŭtoritato.

La apero de Norma Skriba Formo

Kimura: en la kornvala lingvorevivigo evoluis kelkaj malsamaj variantoj, kaj la reviviga movado dividiĝis en grupojn subtenantajn malsamajn variantojn. Kiel ŝanĝiĝis la lingva situacio post oficiala akcepto de la Norma Skriba Formo (NSF) de la kornvala en 2008? Tiu normigo certe estis unu rezulto de la oficiala agnosko.

George: plimulto de la kornvallingvanoj uzas la lingvon rekonstruitan surbaze de la mezepoka formo, kiam la kornvala ankoraŭ estis multe uzata. Malplimulto elektis uzi pli malfruan varianton de la 17a kaj 18a jarcento kiel bazon de revivigo. NSF estis lanĉita por repacigi la uzantojn de la malsamaj formoj de la revivigita lingvo. La ideo estis atingi unuecan skriban formon por uzi en lernejoj kaj por oficialaj dokumentoj. Sed evidentiĝis, ke tio estas neebla, ĉar la malsameco inter la variantoj estas tro granda. Do, NSF fakte ne estas unu formo, sed „multformo”. La aŭstra lingvisto Albert Bock transprenis la taskon proponi unuigan formon. Strange, ke oni petis eksterulon fari tion, anstataŭ demandi fakulojn en Kornvalo mem.

Origine oni planis revizii NSF ĉiun kvinan jaron, kaj en 2013 okazis tia reviziado. Kiel membro de la loknoma laborgrupo alfrontanta NSF, mi rimarkis, ke ekzistas kelkaj malĝustaĵoj. Do, mi proponis kelkajn ĝustigojn en 2013, sed oni malakceptis. Do mi esperis, ke en 2018 oni akceptos. Sed inter la kornvallingvanoj estas opinioj, ke oni prefere ne plu ŝanĝu la proponitan formon. Kiel lingvisto, mi ne povas kontenti pri sistemo kun mankoj, sciante, ke facile ĝustigeblas tiuj mankoj.

Kimura: kiel vi do decidis en la laborgrupo pri kornvallingvaj formoj de loknomoj?

George: ĉar la Konsilio akceptis NSF, ni devas uzi ĝin. Sed kiun varianton de tiu formo ni uzu? Ĉar ĝi estas kvazaŭ multkapa besto. Do ankoraŭ restas malklareco pri la skribmaniero. La subteno por la norma formo estas politika, ne lingvistika. Persone, mi sentus min pli repacigite ene de la movado, se NSF ricevus ĝustigon laŭ lingvistika vidpunkto.

Rilato al Esperanto

Kimura: lasta demando. Viaj gepatroj estis esperantistoj. Ĉu vi povus iom klarigi pri via rilato al Esperanto?

George: mia patro eklernis Esperanton, post kiam mi naskiĝis, do li lernis Esperanton, kiam mi estis infano. Li instigis ankaŭ siajn patron kaj edzinon, do mian patrinon, lerni la lingvon kaj eĉ ekhavis la ideon paroli al mi en Esperanto, kaj li vere tiel faris kiam mi estis eta infano. Do, mi kreskis kun iom da kono pri Esperanto. Kiam mi estis sepjara, mi trapasis ekzamenon de Esperanto. Estas tiom facila lingvo. Poste, eble kiam mi estis 14, mi denove ekzameniĝis. Sed je bedaŭro de mia patro, mi ne daŭrigis lerni la lingvon. Miaj gepatroj multe vojaĝis tra la mondo uzante Esperanton. Ekzemple ili vizitis Pollandon dum la komunisma epoko en la fruaj 1970aj jaroj. Tre rara sperto tiam!

Sed tiel estas ofte inter gepatroj kaj infanoj: la infanoj ne sekvas tiom proksime la vojon de la gepatroj. Mi ekinteresiĝis pri la kornvala lingvo. Kiam miaj gepatroj eksciis tion, ilia reago ne estis aparte pozitiva. Sed fakte mi sekvis miajn gepatrojn iusence, ke mi iĝis lingvisto, kvankam pri alia lingvo. Poste mi ekinteresiĝis ankaŭ pri la bretona lingvo, lingvo kiu plej similas al la kornvala, kaj konatiĝis kun mia edzino bretondevena. Almenaŭ tiam miaj gepatroj komprenis, ke la lingvo povus havi ian utilon.)

Kimura: Kiam mi lernis la Komunan Kornvalan, la plejvaste uzatan varianton de la kornvala, kies skribmanieron vi ellaboris, mi sentis idean similecon kun Esperanto. Ekzemple, unu litero havas unu prononcon, kaj la sistemo estas tre regula. Vi ne sekvis la arbitran skribmanieron trovitan en historiaj dokumentoj, sed proponis logikan skribsistemon. Ĉu vi pensas, ke Esperanto influis vin en via agado por rekonstrui la kornvalan lingvon por moderna uzo?

George: jes, verŝajne vi pravas, ke la sperto pri Esperanto influis min. Sed tio devus esti pli subkonscia ol konscia. Por iuj homoj, Esperanto estas stranga konstruita lingvo, kiun oni prefere ne menciui en kunteksto de lingvorevivigo. Kompreneble iusence la nuna kornvala estas parte konstruita lingvo. Kaj fakte ĉiu lingvo estas parte konstruita. Ĉar oni ja devas adapti la lingvon al ĉiam novaj sociaj defioj: ekzemple kiam nova nocio estas bezonata, oni devas elpensi novan vorton. Estas ridinde diri, ke la angla aŭ japana rajtas evolui, sed la kornvala ne. El vidpunkto de lingvoplanado, mi pensas, ke estas multe pli bone agnoski, ke inter la kornvala movado kaj la esperanta movado troviĝas intimaj similecoj.

Kimura: dankon pro la interesa interparolo.

KGC

“Mejloŝtono en Sudameriko” (1)

La mapuĉa popolo ĵus ekeldonis en Ĉilio la unuan amaskomunikilon, kiu aperas nur en la mapuĉa lingvo: la gazeton “*Pürüm Llemay*”. Kreita de la popolo, ĝi celas esti por la popolo.

Por la indiĝenaj popoloj de Sudameriko ekzistas multaj ĵurnaloj, sed plejofte en iliaj paĝoj aperas hispanlingvaj tradukoj. La 15an de majo, en Ĉilio, aperis la unua gazeto publikigita en la mapuĉa lingvo: *Pürüm Llemay*. Ĉiuj artikoloj estas en la mapuĉa, kaj, pri tiu aspekto, al la direktoro *Elizabeth Nuñez* ŝajnas, ke tio povas esti mejloŝtono por Sudameriko: En Sudameriko ne estis amaskomunikilo verkita nurnure en iu indiĝena lingvo, sen hispanlingvaj tradukoj. Tial la naskiĝo de la gazeto povas esti grava ankaŭ por aliaj popoloj.”

Oni komencis distribui kaj vendi la gazeton en la ĉiliaj urboj Santiago, Temuko, Koncepciono kaj Valparaíso. «Ni ĝin distribuadas je eta skalo ankoraŭ. Oni devas preni en konsideron, ke 80 % de la mapuĉoj vivas en Santiago kaj grandaj urboj.»

Nuñez opinias, ke la kreo de la gazeto povas esti fundamenta por la mapuĉa lingvo: «Tiuj, kiuj kontrolas la amaskomunikilojn, kontrolas ankaŭ la ideojn. Al ni gravas videbligi la lingvon. Ili redonu al la lingvo ties statuson kaj valoron, por ke ĝi atingu la saman staton, kiun ĝi havis antaŭ la invado de la mapuĉa teritorio. Tial tre gravas, ke estu pli da amaskomunikiloj en la mapuĉa. Ĉar ĝi estas la maniero informi, eduki kaj disvastigi vortojn, konceptojn kaj neologismojn.»

La projekto komenciĝis kun dek laboristoj. Iom post iom oni ŝatus ricevi kunlaboraĵojn de civitanoj, kiuj skribas mapuĉe. La gazeto estos monata, sed *Nuñez* avertas, ke ili estas debutantoj. «Ni ne fiksas la periodecon; ni vidos dumvoje.»

Rilate la financadon, cetere, oni aranĝis lotadon por povi eldoni la komencan numeron. «Por la dua numero ni uzis la monon de la vendo de la komenca numero. Ni antaŭeniras danke al la mono deponita de la civitanoj, kiuj amas la lingvon», klarigis la gazetdirektoro.

Pri la enhavo, oni pritraktas temojn de ĝenerala intereso el la mapuĉa lando. «Kelkajn informojn oni sendas al ni ankaŭ el Laplato en Argentino. Ni volas prilabori temojn okazantajn en niaj teritorioj, jen tiujn, kiuj influas la mapuĉojn, jen tiujn, kiuj influas la ceterajn», substrekiis *Nuñez*.

La iniciatintoj de la projekto dekomence substrekiis la neceson videbligi la lingvon en la socio. Por tio kuniĝis aro da personoj, kiuj instruas kaj subtenas la mapuĉan. Kaj nun ili havas gazeton kiel valoran ilon.



Interreto, la venonta paŝo

Nuñez, aliflanke, avertis pri la malfacila situacio de la mapuĉa: «Ĝi estas sub minaco de malapero.» La lingvon kapablas paroli 30 % el la mapuĉoj. «En la regiono Araŭkanio ĝi ne estas oficiala, kaj ĝi havas nenian statuson en la lernejoj. Se pli ol 15 % el la lernantoj estas mapuĉoj, oni instruas al ili la mapuĉan du horojn semajne, sed ne pli.» *Nuñez* plendas, ĉar en la lernejoj oni ne konsideras prioritaton instrui la mapuĉan.

Ekzistas, aliflanke, kelkaj komunumaj radioj, kiuj elsendas en la mapuĉa, sed ne nur per ĝi. En tiuj la ĉeesto de la hispana kutime estas pli granda.

Rigardante antaŭen, *Nuñez* rimarkigas, ke oni volas plividebligi. «Ni intencas krei retpaĝon, kaj ni ŝatus, ke tie la homoj povu legi kaj aŭskulti novaĵojn en la mapuĉa. En Ĉilio multaj homoj neniam aŭdis la mapuĉan.»

La gazeta direktoro krome diras ke en Ĉilio la riĉuloj kontrolas la amaskomunikilojn. «*Pürüm Llemay* malproksimas de ili. Nia ĵurnalismo estas farata de la popolo kaj por la popolo. Nia eldonprinciparo estas longe for de la bulvarda gazetaro, kaj ni klopodas ne aperigi seksismajn temojn.» Ŝi memorigas, ke multaj ĵurnaloj kaj gazetoj utiligas inajn nudbildojn por vendi pli.

UU

Notoj:

(1) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 24-an de Junio 2018-a. Tradukis: *Nikolas Xil Carvalho*. Oktobro 2018-a.



“Antaŭe, ni estis ‘ebriuloj kaj mizeruloj’; nun, ‘teroristoj’” (1)

Intervjuo kun *Paula Huenumilla*. Mapuča instruisto.

Paula Huenumilla laboras por liberigi la mapučojn de ties stigmatoj kaj por disvastigi ilian lingvon. Ŝi estas nuntempe (1) en Eŭskio, por lerni la eŭskan kaj por kunporti ĝian modelon en sian landon. *Paula Huenumilla (Arauco, Mapučio, 1991)* alvenis al la internulejo de Sornoco por sin meti en la lokon de eklernanto de la eŭska. Ŝi instruas la mapučan lingvon kaj ankaŭ membras en la asocio *Mapuzuguletuaiñ*. Ŝi nun lernas la eŭskan por scii, kion sentas la lernantoj dum ili lernas novan lingvon. Ŝi venis ankaŭ por lerni strategiojn, kaj kiel ilin enplanti, por daŭre fortikigi la mapučan lingvon en Mapučio.

UGL: vi estas novparolanto de la mapuča. Kia estis la lernado?



PW: Antaŭ 100 jaroj oni ĉesis paroli la mapučan en mia familio. En mia regiono la lingvo malaperis antaŭ longe. El mia familio mi estas la unua, kiu eklernis la originan lingvon de la mapučoj, kaj kun mi venis pli juna fratino. Mia unua kontakto kun la lingvo estis en 2015, kaj tiam mi eĉ ne kapablis diri “saluton”. Neniam antaŭe mi aŭdis parolanton de la mapuča, kaj el tio, kion mi aŭdis, mi komprenis nenion. La metodaro kaj la lernomaterialoj estas tre nesufiĉaj, kaj la instruistoj, eĉ se ili estas mapučparolantoj, havas nek pedagogion nek instruilojn. Tamen, la homoj volas iel lerni, kaj pro tio fine lernas.

UGL: kaj el lernanto vi fariĝis instruanto. Ĉu tiuj du kompletigas unu la alian?

PW: instrui helpas lerni. Mi instruas, kion mi scias, kaj, se mi volas instrui, mi devas lerni pli. Esti instruisto motivigas vin lerni pli: vi devas pretigi la lernotaĵon, kaj la lernantoj havas dubojn pli kaj plu. Transdoni la akiritaĵon estas procezo, kaj tio tre belas. Tamen, ni rimarkis, ke pri pedagogio ni tre lamis.

UGL: kaj el tio vi alvenis al lernado de la eŭska, ĉu?

PW: jes. Antaŭ la pasinta jaro, ni fokusis niajn strebojn

je la gramatiko: ni lernigis konjugaciojn. Ni edukis lernantojn sciantajn pri la lingvo, sed ne parolantojn. Tiam ni komencis cerbumi, kion ni povus fari, por ke la homoj parolu, eĉ se tio estas tre baza afero. Dum mia unua vojaĝo en Eŭskio, mi ĉeestis eŭsklingvan kurson, kaj tie mi rimarkis, ke la celo estis paroligi la lernantojn. Tiam mi proponis, ke tri el ni venu tien ĉi kaj metu sin en la rolon de eklernanto de la eŭska. La celo estas vidi, kiun influon la metodo havas sur nin. Vi scias nenion, kaj iu venas, kiu instruas al vi la eŭskan. Vi speguliĝas en iu alia; en tiu ĉi kazo, en eŭskinstruanto.

UGL: vi havas malabundan skribitan literaturon. Ĉu tio malfaciligas la lingvotransdonon?

PW: Jezuitoj kaj esploristoj estis tiuj, kiuj unue komencis skribi en la mapuča. La unua mapuča libro estas de 1556, kaj en 1910 oni eldonis la unuan libron verkitan de mapučo. En 1980 la eklezio ekigis alfabetigokampanjon. Eĉ se la ideo estis traduki la biblion, la mapučparolantoj komencis lerni skribi kaj, danke al tiu procezo, oni sukcesis produkti lego- kaj lernolibrojn. Legi skribitaĵon helpas teni la lingvon. Tamen, oni perdas multan energion kaj tempon kreante dulingvan materialon. Se ĝi estas en la hispana, ĝi valoras por nenio. Oni devas verki lernilojn en la mapuča.

UGL: ne nur skribi, plej multaj mapučoj ne scias paroli la mapučan. Kial?

PW: la mapuča popolo ege suferis. Ni mapučoj antaŭe estis “ebriuloj kaj mizeruloj”; sed nun “teroristoj”. Multaj nenion ajn volas scii pri mapučoj, sed kelkaj aliaj komencis ami sian popolon. La generacio post la diktatoreco faris rompon: ni ne estas ĉilianoj, ni tion ne volas. Grandan asimiladon ni suferis, kaj tion ni volas fini.

UGL: ĉu vi perceptas tian suferon en Eŭskio?

PW: se ni komparas nin kun Eŭskio, la du kazoj similas, precipe se kompari kun Norda Eŭskio. Rilate multajn aferojn ni estas tre for de la ĉi-tieaj atingoj, sed la situacio en Norda Eŭskio kaj la nia estas similaj: ne estas oficialeco, kaj ne ekzistas agnosko. Tie ĉi multaj junuloj ne konscias, kiom devis batali la antaŭaj generacioj por atingi la nunan staton. Parolante kun eŭsklingvanoj mi vidas, ke mi samopiniis kun la 40-50-jaraĝaj homoj.

UGL: krom la instrumentodaron, kion vi alportos el Eŭskio al via lando?

PW: esperon. Nia stato tre malbonas, sed mi vidis tie ĉi, ke per granda strebo oni multon povas atingi. Mi antaŭsentas, ke ni povas multon atingi. Se ni sukcesas konvinki multajn homojn, eble la lingvo ne perdiĝos. Tiu ĉi laboro neniam finiĝas, sed ĝi ne estas neebla. **UGL**

Notoj:

(1) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 19-an de Julio 2018.

Tradukis: *Nikolas Xil Carvalho*. Oktobro 2018.

KONCIZE EL ...



Eŭskio - Okaze de la festo *Nafarroa Oinez* en *Altsasu* (Nafaro), kaj kadre de la iniciato *Txikiak Handi* (Malgrandaj grande), la 20an de oktobro okazis kunveno pri revigligo de lingvoj de etnaj malplimultoj dise tra la mondo. Suke prelegis irlandano *Ronan Mac Con Iomaire*, *Johan Haggman* el la eŭropa komisiono kaj *Yazmin Novelo*, nome el Radio *Yuuyum* de *Jukatan* (Meksiko). La kunvenon partoprenis reprezentantoj el minoritatoj de amerikaj indiĝenoj, kiuj agadas en lingvo instruado aŭ lokaj komunikiloj, aktivuloj inter aliaj de la *kaxinawa*, *guarani*, mapuĉoj, maja aŭ keĉua lingvoj. Ĉi-tiuj kulturagantoj trajniĝas en kurso aranĝita de la neregistara organizo *Garabide*, kiu fakas pri procesoj de revigligo de minacataj lingvoj kaj kulturoj.

RFAB

Hispanio - Justico senbridiĝas kontraŭ katalunaj sendependistoj. La 1an de oktobro 2017 okazis referendumo en Katalunio (Generalitato) por decidi pri ties sendependiĝo. Sed male al tiu, kiu organiziĝis en Skotlando tri jarojn antaŭe, tiu balotado ne estis permesita de la centra registaro de la lando. Naŭ politikaj respondeculoj katalunaj, du virinoj kaj sep viroj, estis enkarcerigitaj kaj plu estas fakte politikaj malliberuloj. Temas pri *Dolors Bassa*, *Jordi Cuixart*,

Carme Forcadell, *Joaquim Forn*, *Oriol Junqueras*, *Raul Romeva*, *Josep Rull*, *Jordi Sanchez* kaj *Jordi Turull*. Kontraŭ ili la prokuroro de la plej supera tribunalo petis entute 210 jarojn da karcero, tio estas po inter 16 kaj 25, pro ribelo, malversacio kaj subfosado. La verdiktoj estos eldiritaj komence de 2019. Krom tio ok homoj fuĝis eksterlanden por eskapi tian justicon, sed riskas esti resenditaj al Hispanio, kiel ekzemple la antaŭa prezidanto de la kataluna registaro, *Carles Puigdemont*. Jen politikaj rifuĝintoj ene de Eŭropa Unio... Kompreneble ekzistas gravaj problemoj en Hispanio, kie antaŭnelonge la tutnova ekstremdekstra partio *Vox* (por *vox populi*, la voĉo de la popolo) atingis 11 % de la esprimitaj voĉoj kaj akiris 12 deputitojn en la nova andaluzia parlamento. Kaj temas pri tuthispania partio, kiu povus gajni multon, se en 2019 la landa parlamento estos dissolvita pro nesufiĉa subteno al tre fragila registaro. Eble la jam malfacila dialogo inter Madrido kaj Barcelono ne plu povos okazi kaj vekiĝos fantomoj de intercivitana milito kaj diktaturo.

AF



El Vikimedia. Aŭtoro : *Contando Estrelas*.

Vox agas en la palaco *Vistalegre*, Madrido.

SEKVE EL ...

Tiu ĉi nova rubriko celas doni sekvon al artikoloj, kiuj aperis en lastaj numeroj de *Etnismo*.

Nov-Kaledonio - Survoje al nova referendumo. En la numero 99-100 de *Etnismo* ni dediĉis longan artikolon al Nov-Kaledonio, franca teritorio de Oceanio. En la momento de la verkado, antaŭ unu jaro, ni ankoraŭ ne konis la daton de referendumo, kiu devos decidi pri la estonto de tiu insularo, tio estas ĉu resti en Francio aŭ iĝi sendependa. Tiu voĉdonado okazis la 4an de novembro. Kelkajn tagojn antaŭe opiniesploroj antaŭvidis 70 % da voĉoj por la subtenantoj de Francio, sufiĉe normala manipulado en tiu

jakobenisma, eĉ plu koloniisma, lando, por malkuraĝigi plej multajn sendependistojn uzi sian balotilon. Sed tio ne sukcesis, pli ol 80 % de la rajtigitoj iris voĉdoni, kaj la opcio resti en Francio gajnis per nur 56,7 % de la voĉoj, post kampanjo tre favora al franciemuloj, interalie kun vizito (ne aparte neŭtrala) de la prezidento *Macron*. Plej grave, du provincoj el la tri de Nov-Kaledonio voĉdonis ege favore al sendependiĝo, dum la plej loĝata – tiu de Numeo, la insulara ĉefurbo – decidis pri restado en



<http://www.naturerights.com/blog/?p=2084>

Manifestacio kontraŭ la "Ormontaro", la 4an de aprilo 2018.

Francio. Sed nova referendumo povos okazi ekde 2020, se triono de la membroj de la venonta teritoria kongreso postulos tion. En 2019 okazos balotoj, kaj la sendependistoj de FLNKS (federacio de kanakaj partioj) esperas plifortigi sian pozicion: ili jam havas 25 el la 54 membroj de la kongreso. Intertempe Parizo devos tutcerte pliampleksigi la aŭtonomion de la teritorio kaj interalie la respekton al la kanaka identeco kaj kulturo. Aliflanke, sendependeco estos mastrumata ne nur de kanakoj, ĉiuj komunumoj devos lerni pli bone kunvivi, kaj la gravaj konfliktoj, kiuj okazis en sendependaj Fiĝioj inter hindo kaj melanezianoj montras, kiom malfacile povas esti.

Francia Gujano - junaj indiĝenoj organiziĝas. La "eldonista letero", kiu malfermis la numeron 98 de nia revuo, traktis la temon de "aŭtoktoneco kaj sinmortigo" per la detalita ekzemplo de la indianaj junuloj de francia Gujano. Tiu sudamerika, amazonia teritorio nun havas statuton de "normala" franca departemento kaj regiono (tiuj du por la sama teritorio, normale en Francio regiono havas plurajn departementojn, ofte nun eĉ tro multajn...). La loĝantaro de tiu teritorio estas tre diversdevena, sed plu ekzistas indianoj, pli malpli dek mil homoj, tio estas proksimume 5 % de la gujanaj loĝantoj. Ili vivas en la arbara interno de la teritorio, plejofte for de la urboj. Proporcie multe pli da junuloj mortigas sin ol samaĝuloj en tuta Francio (kie tiu plago jam atingas relative altan procenton), pro manko de perspektivoj, diskriminacio, malfacila adaptiĝo al okcidenta vivmaniero... Kvankam el Parizo oni promesis okupiĝi pri tiu problemo, la solvo grandparte venos de tiuj junuloj mem. Ili do fondis JAG – *Jeunesse Autochtone de Guyane* (Aŭtoktona Junularo de Gujano), kiu kunigas gejunulojn el la ses indianaj nacioj de la teritorio. Ili nuntempe ege aktivigas ekzemple por la instruado de la indianaj lingvoj kaj la protektado de la gujana naturo, interalie kontraŭ la

konstruo de *Montagne d'Or* (Ormontaro), giganta liberĉiela orminejo, kiu plensubtene de la franca registaro detruos nemalgrandan parton de la praarbaro kaj abunde poluos riverojn, kie interalie fiŝkaptas indiĝenoj. Kvankam plene konsciaj pri sia malplimulteco, tiuj junuloj fariĝas kerno en la batalo por la digno kaj pureco de tiu teritorio, kun-

igante al si multajn alidevenajn aktivulojn. *AF*

Ĉinio - centmiloj da uĝuroj en "reedukaj kampoj".

La sama, 98a numero de *Etnismo*, havis la ĉeftemon "uĝuroj: ĉu ribelantoj aŭ viktimoj?". Uĝuroj konsistigas tjurkan etnon, kiu plejparte vivas en Ŝingĝango, nordokcidenta regiono de Ĉinio; oficiale tiu teritorio estas "aŭtonoma", sed fakte ĝi (kompreneble) estas regata de la Ĉinia Komunisma Partio – kies komunismeco ni ne priparolos ĉi tie – kaj rekte laŭ ordonoj el Pekino. Uĝuroj estas islamanoj, do kaj lingve kaj religie malsamaj de la regantaj hanoj, kiujn oni pli kaj pli sendas al Ŝingĝango por laŭnombro minoritatigi uĝurojn en ties propra regiono, kun samtempa drasta malpliigo de la kulturaj kaj religiaj rajtoj de tiu malplimulto. Uĝuroj jam de pluraj jardekoj vigle reagis al tiu asimilado per demonstracioj, tumultoj kaj eĉ atencoj, spite al abunda uzo de enkarcerigo kaj mortpuno fare de la ĉina justico. Nemalmultaj el ili, kiuj migris eksterlanden, vigle helpas siajn sametnanojn en Ĉinio, kio ne aparte plaĉas al ties diktatoreca reĝimo. La plej lasta inventaĵo de la pekina registaro estas la kreado de "reedukaj kampoj", kie oni "lavas la cerbon" al centmiloj – eble pli ĝuste miliono – da uĝuroj dum longaj monatoj, se ne jaroj (kiam ili ŝancelas tie ne morti), per kompreneble teruraj metodoj. Lastatempe Ĉinio devis oficiale agnoski la ekziston de tiaj kampoj, kiuj ege similas tiujn de la tiel nomata "kultura revolucio" antaŭ 50 jaroj. Sed la pekina registaro asertas, ke ĝi tutsimple luktas kontraŭ islama terorismemo, kiu plagas uĝurojn kaj endanĝerigas la tutan landon. Kompreneble eĉ ŝtatoj, kie oni oficiale plej subtenas homajn rajtojn, nenion rebatas al tia argumento tiom pli, ke Ĉinio fariĝis neanstataŭebla partnero komerca same kiel timiga militpotenco. Do en eĉ ne "bruega" silento daŭros etnocido, kiu laŭbezone povos facile transformiĝi al vera genocido.

AF



INFORMILO 81

Internacia
komitato
por
Etnaj
Liberecoj,
Honora prezidanto: Uwe Joachim Moritz

IKEL trifoje manifestiĝis dum la la 103a Universala Kongreso en Lisbono: sabate vespere dum la Movada Foiro, kiu logis multajn vizitantojn. Bedaŭrinde la lokoj ne sufiĉe vastis por ilin akcepti kaj malfacilis al la interesatoj stari antaŭ nian budon sen ĝeni la preterpasantojn.

Marde matene okazis nia membrokunveno, kies protokolo vi povas legi ĉifronte:

Membrokunveno de IKEL, 31a de julio 2018, Lisbono

1. Bonvenigo.

Je la 11a horo la prezidanto, *Alain Favre*, bonvenigas la ĉeestantojn. El ili 13 voĉdonrajtas. La vicprezidantino *Nicole Margot* estas sekretario de tiu ĉi kunveno.

2. Prezento de IKEL.

István Kabók, membro de **IKEL**, intervenas pri la eŭropa iniciato *Minority SafePack* favora al la minoritatoj, pri kiu *Etnismo* raportis en sia lasta numero (101), p. 16.

Alain Favre proponas, ke ni verku leteron nome de **IKEL** por apogi la iniciaton. Tiu ĉi propono estas unuanime akceptita.

3. Agadraporto de la prezidanto.

«Ni komencu per nia revuo *Etnismo*. Dum la lastaj du jaroj ĝi aperis preskaŭ regule; en 2017 nia redaktorino travivis familian problemon. Pro tio la numero 99 ne aperis lastsomere, sed kompanse vintre ni publikigis duoblan numeron (99-100) tutkoloran. Komence de tiu ĉi monato aperis la numero 101, sed multaj ekzempleroj estas pli-malpli fuŝaj, ĉu pro tro nigraj fotoj, ĉu pro strio sur multaj paĝoj. (La presejo devus iel kompensi.)

Antaŭ kelkaj jaroj mi diris, ke mi tre ŝatus, se ni atingus la centan numeron papere. Tio ja povis realiĝi. Antaŭ tri jaroj ni rekreis retejon – etnismo.org, danke al la helpo de *Stefano Keller* el Svislando. Ni provas ĝin riĉigi per enmeto de malnovaj numeroj de *Etnismo*, kiuj do legeblas nun en elektronika formo. Ekzistas forumo, kiu iom vivas (pluraj kontribuoj aperis ĉi-monate). Ekzistas ankaŭ la rubriko “Laste aperis/laste okazis”, kie ni freŝdate enmetis artikolojn pri Kurdio. Kompreneble ĉiu povas proponi artikolojn, anoncojn kaj aliajn kontribuojn al la prezidanto aŭ vicprezidantino.

Pluraj **IKEL**-anoj partoprenas en la agadoj de UEA ĉe Unesko en Parizo kaj UN en Ĝenevo. En tiu lasta loko temas ĉefe pri kunsidoj pri homaj rajtoj kaj

minoritatoj, kio ebligas krei kontaktojn kaj provi diskonigi Esperanton al malplimultanoj. Danke al tiuj rektaj kontaktoj aperis artikoloj en *Etnismo*, ekzemple pri indianoj en centra kaj suda Ameriko kaj pri kurdoj. La UK estas preskaŭ la sola loko, kie diverslandaj **IKEL**anoj povas fizike renkontiĝi. En ĉiu lastatempa UK ni povis partopreni en la movada foiro – kiu ĉi-jare atingis pinton de premo kaj sufokiĝo. Antaŭ du jaroj en Nitro ni havis prof-inon *Poláková*, dekanon de la Internacia Kongresa Universitato, kiel prelegantinon. En Seulo neniu kunsido de **IKEL** povis esti organizita. Ĉi-jare, post du tagoj prelegos *Rafael Bianco-Arbe*, kaj pli malfrue li certe povos rapide prezenti la temon de sia prelego.»

La agadraporto estas unuanime akceptita.

4. Financa raporto.

La kasisto, *Xabier Rico Iturriotz*, prezentas la bilancon kun pozitiva saldo de € 4441,79 je la 31.12.2017. Nia jubilea tutkolora duobla numero (99-100) de *Etnismo* estis aparte kosta pro la presado kaj la sendokostoj (pli ol po 100 gramoj por ĉiu numero): € 1088.50. La lasta saldo ricevita de nia konto ĉe UEA altiĝas je: € 3683.75.

Propono: La kotizo pagata dum la Universala Kongreso estu rabatita kun 2 numeroj senpagaj.

La raporto estas akceptita kun unu sindeteno.

Elektioj de la estraro. *Nicole Margot* prezentas la estraron, kiu re-prezentiĝas kaj estas unuanime bloke reelektita.

5. Projektoj kaj perspektivoj.

La redaktorino enposteniĝis antaŭ 15 jaroj. Ŝi scipovis doni (normale) belan aspekton al la revuo, daŭre ricevas gratulojn, sed dezirus nun trovi anstataŭanton. Lastjare okazis diskuto sine de la estraro, kaj ni decidis daŭrigi la revuon sub ĝia nuna papera formo. Ŝajnas, ke la financoj nuntempe plu ebligas tion. Tamen vi jam povas peti elektronikan formon de la revuo.

La jaro 2019 estos por UN tiu de la indiĝenaj lingvoj. Kial ne organizi eventon pri tio, kio plene kongruas kun niaj celoj? Eblaĵo estus aparta renkontiĝo kadre de UN aŭ Unesko. Kompreneble **IKEL** ne povos agi tute sola, sed kunlabore kun UEA ni povus organizi ion, ekzemple en Parizo aŭ Ĝenevo. Kompreneble oni devas rapide trovi ideon kaj ĝin konkretigi al preciza projekto.

Japana ĉeestanto donas informojn pri sia lando: 2% da enmigrintoj en Japanio, kies loĝantoj maljuniĝas, tio estas malpli ol en Eŭropo. La ĉefaj minoritatoj de Japanio estas Ajnuoj, loĝantoj de la Okinava Insularo kaj koreanoj.

Rafael Bianco prezentas sian prelegon pri “La skriba normo de la eŭska”.

Ni proponas al tiuj, kiuj tion deziras, rendevuon por komuna vespermanĝo.

La kunveno finiĝas ĉirkaŭ la 12h 30.

NM

IKEL en Lisbono, fotoalbumo

Movada Foiro



Membrokunveno



Prelego de *Rafael Arbe-Bianco* pri Eŭskio



Erratum!

En la lasta numero de *Etnismo* (101), p. 14, en la artikolo "La romanĉa lingvo fariĝis nacia antaŭ 80 jaroj" ni montris du malnovajn biletojn: telferan bileton en la romanĉa kaj itallingvan bileton de la Reta Fervojo, validan en 1958. Malfeliĉe ni erare montris dufoje la saman bileton. Ni bedaŭras ĉar tiuj ĉi biletoj, raraj, estas bona ekzemplo de la trilingveco de la kantono Grizono. Tial ni remetas ilin ĉidekstre.



El la kolekto, kaj fotita de Pierre-André Michaud.

Deklaracio de *Sitting Bull*

En 1876 la du lakotaj (siauj) ĉefoj *Crazy Horse* kaj *Sitting Bull* alianciĝis ankaŭ kun ĉejenoj por haltigi la kolonion fare de usonanoj, kaj komence havis grandajn sukcesojn. Jen antaŭmilita deklaro kaj alvoko de *Sitting Bull*.

Vidu, miaj fratoj, venis printempo; la tero ricevis la brakumon de la suno, kaj ni baldaŭ vidos la fruktojn de tiu amo!

Ĉiu semo vekigis kaj ĉiu besto ekvivas. Al tiu mistera potenco ankaŭ ni ŝuldas nian ekziston; tial ni koncedas al niaj najbaroj, eĉ al niaj bestaj najbaroj, loĝi en ĉi tiu lando.

Tamen aŭskultu min, ĉiuj el vi, nun temas pri alia raso, malgranda kaj malforta, kiam niaj patroj renkontis ĝin por la unua fojo, sed nun granda kaj aroganta.


Sufiĉe strange, tiuj homoj havas la ideon kultivi la grundon kaj la amo de posedado estas ĉe ili malsano. Ili establis multajn regulojn, kiujn la riĉuloj povas malrespekti sed ne la malriĉuloj.

Ili kolektas impostojn el la malriĉuloj kaj malfortuloj por subteni la riĉulojn, kiuj regas. Ili postulas nian komunan patrinon, la teron, por sia propra uzo kaj sin enŝlosas barikade kontraŭ siaj najbaroj; ili turpigas la landon per siaj konstruaĵoj kaj rubaĵoj.

Ĉi tiu nacio estas kiel rivereto de fandita neĝo, kiu eliras el sia lito kaj detruas ĉion sur sia vojo.

Ni ne povas vivi apude.

Sitting Bull, ĉefo de hunkpaj siajoj (1875)



< https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/a/a5/Langs_N.Amer.png >

Supoza distribuo de Indiĝenaj Lingvogrupoj de Nordameriko antaŭ koloniado (nomoj en la angla).